# PRAGO

**La situo kaj nuna stato de Prago**

Prago estas la plej granda kaj plej grava urbo de Ĉeĥa respubliko. Ĝi estas la ĉefurbo de la ŝtato seninterrompe ekde la 9-a jc. Ĝi situas inter 49°56' kaj 50°10' N (norda latitudo) kaj inter 14°13' kaj 14°42' E (orienta longitudo) en 1a malebena teritorio de la Praga Kaldronvalo kaj de la Centrabohemia kolinaro ĝin ĉirkaŭanta. La teritorio de Prago havis amplekson de 496,12 km$^2$. La plej alta loko de la praga teritorio troviĝas okcidente de Zličín, ĝi estas 399 m super la marnivelo, kaj la plej malalta punkto estas la nivelo de la rivero Vultavo ĉe Suchdol, kie la rivero forlasas la teritorion de la urbo - ĝi troviĝas 177 m super la marnivelo. La klimato de Prago estas milda, iom seka kaj varma, la averaĝa jara temperaturo dum lastaj jaroj varias inter 9,3 °C kaj 10,9 °C, plej varme kutime estas en julio (averaĝe 19,5 °C), la plej malvarma monato estas januaro (-0,5°C). La jara mezkvanto de pluvaj kaj neĝaj precipitaĵoj estas 470 mm. La jara nombro de pluvtagoj estas meznombre 154, de tagoj sen suna lumado 67, de frostotagoj 87, de tagoj kun nebulo kaj smogo 21, de tagoj kun tropika varmo (pli ol 30°C) 14, 1a suno lumas averaĝe jare 1652 horojn.

La nombro de loĝantoj de Prago evoluis jene: en la jaro 1350, do dum la regado de reĝo Karolo IV-a, Prago havis proksimume 40 mil loĝantojn, la statistikaj donitaĵoj el la j. 1843 sciigas, ke tiam en Prago estis 111 mil loĝantoj, en la j. 1910 224 mil, sed kun la ĉirkaŭurboj jam 617 mil loĝantoj, en la j. 1922, kiam Prago jam estis la ĉefurbo de la nova ŝtato Ĉeĥoslovakio kaj kiam ĝi estis per leĝo pligrandigita je ĉirkaŭaj urbetoj kaj vilaĝoj, do tiam ĝi havis jam preskaŭ 677 mil loĝantojn, en la j. 1938 la nombro de loĝantoj jam atingis preskaŭ unu milionon. Post la dua mondmilito la nombro de la pragaj loĝantoj malkreskis pro la ellandigo de germanaj loĝantoj tiel, ke fine de la jaro 1954 Prago havis 951 mil loĝantojn, en 1964 1,014 mil, en 1995 jam 1,214 mil, dum en 2001 nur 1,168 mil, el ili 31 mil eksterlandanoj. La nombro de loĝantoj por 1 km$^2$ (la denseco de loĝateco) estas 2 438. Ĉiujare Pragon vizitas 3 milionoj da turistoj.

En la j. 2001 en Prago estis 89 867 domoj, el tio
81 390 domoj daŭre loĝataj, el tio
49 197 familiaj domoj
565 889 loĝejoj, el tio
504 135 loĝataj logojoj.

En Prago estas 23 malsanulejoj, 72 ambulatoriaj instalaĵoj, 244 apotekoj, 351 infanĝardenoj (antaŭlernejoj), 236 bazaj lernejoj, 2-37 mezlernejoj kun 78 mil studentoj, 8 altlernejoj kun 36 fakultatoj kaj 74 mil studentoj.

En la teritorio de Prago troviĝas 26,1 km$^2$ da parkoj, la totala areo de verdaĵoj estas 104,8 km$^2$, do ĉirkaŭ 1/5 de la urba teritorio. En Prago troviĝas kvar naturrezervejoj: Prokopské-valo, Radotínské-valo, Roztocký-bosko kaj Satalická-fazanejo, kaj du naturmemoraĵoj: Petřínská-roko kaj la Reĝa ĉasarbaro.

Prago situas preskaŭ en la centro de Eŭropo: de Balta maro ĝi distancas 365 km, de Norda maro 495 km kaj de Adria maro 490 km.

Prago estas la plej granda industria, komerca kaj financa centro de Ĉeĥio. Aktivas ĉí tie 420 ŝtataj entreprenoj, 2269 akciaj kompanioj, 1990 kooperativoj, 754 registritaj metiistaj negocejoj. En la urbo laboras 705 mil personoj (ankaŭ loĝantoj de ĉirkaŭaj urboj), grand-parte en la industria produktado (125 mil), en la transporto (52 mil), en la konstruado (50 mil), en la komerco (68 mil), en la publika administrado kaj sociala prizorgado (28 mil), en la sanprotektado (43 mil) kaj en la lerneja sistemo (49 mil). 40 % de laborantoj posedas kompletan mezlernejan edukon kun maturecekzameno, 20 % altlernejan edukadon. La senlaboreco en Prago estas proks. 0,28 % (1994).

La ĉefurbo Prago estas historia monumento, kultura, socia kaj politika centro de la lando. Ĝi estas la sidejo de la prezidento, parlamento, registaro kaj de aliaj pintaj organoj de Ĉeĥa respubliko. Ĉi tie havas rezidejon diversaj internaciaj organizaĵoj kaj ankaŭ la tutŝtataj reprezentejoj de politikaj partioj, de asocioj, bankoj, akciaj kompanioj, fondaĵoj kaj aliaj societoj. Bedaŭrinde ĈEA estis devigita forlasi sian sidejon en Prago kaj num ĝi funkcias en Poděbrady.

En Prago havas siajn sidejojn la plej gravaj naciaj kaj ŝtataj kulturaj kaj sciencaj institucioj

kun longjara tradicio, kiel la Karola universitato (fondita en 1348), la Ĉeĥa teĥnika altlernejo, Nacia muzeo, Nacia teatro, Nacia galerio, Akademio de sciencoj k. a. Ekzistas ĉi tie 27 konstantaj teatroj, 50 muzeoj kaj 111 publikaj bibliotekoj. En la urbo estas aranĝataj gravaj enlandaj kaj internaciaj politikaj, kulturaj kaj sciencaj kongresoj, konferencoj, festivaloj. Ekz. en Prago okazis du UK de Esperanto, la 13-a en la j. 1921 kaj la 81-a en la j. 1996. La plej konata estas la muzikfestivalo La Praga Printempo, kiu okazas regule ĉiujare ekde la j. 1946.

La ĉefurbo Prago estas administracie divídita je 10 urbaj distriktoj, en kiuj troviĝas 57 memadministraj urbaj partoj (kvartaloj).

Origine Prago konsistis el kvar memstaraj urboj, nome la Malnova Urbo (fondita inter 1232 - 1234), la Malgranda Urbo (fondita 1257), Hradčany (fondita ĉirkaŭ 1320) kaj la Nova Urbo (fondita en 1348). Tiuj ĉi kvar urboj estis kunigitaj en unu urbon en la j. 1784 fare de imperiestro Jozefo II. Ekde tiam oni parolas simple pri Prago. Sed la urbo kreskis plu: en la j. 1850 oni administracie alligis la Judan Urbon sub la nomo Josefov, kiel Prago V., en la j. 1863 oni alligis Královský Vyšehrad kiel Prago VI., en 1884 Holešovice-Bubny kiel Prago VII., en 1901 Libeň kiel Prago VIII.

Ekde la 1-a de januaro 1921 estis formita la Ĉefurbo Prago (laŭ la leĝo n-ro 114/1920 Kol.de leĝoj kaj ediktoj) kun jenaj aldonitaj urbopartoj: Bohnice, Hloubětín, Karlín, Kobylisy, Prosek, Střížkov, Troja, Vysočany, Břevnov, Bubeneč, Dejvice, Hlubočepy, Jinonice, Košíře, Liboc, Motol, Radlice, Sedlec, Smíchov, Střešovice, Veleslavín, Vokovice, Braník, Hodkovičky, Hostivař, Krč, Michle, Nusle, Podolí, Královské Vinohrady, Vršovice, Záběhlice, Malá Chuchle, Zátiší, Hrdlořezy, Malešice, Staré Strašnice, Žižkov.

En la j. 1960 laŭ § 17 de la leĝo n-ro 36/1960 Kol. estis alligitaj al Prago: Ruzyně, Čimice, Jenerálka (el Nebušice), randaj partoj de vilaĝoj Kunratice, Holyně, Řeporyje, Lysolaje, Přední Kopanina, Ďáblice, Dolní Chabry, Háje, Petrovice.

Ekde la 1-a de januaro 1968 laŭ la leĝo n-ro 111/1967 Kol. al Prago apartenas jenaj vilaĝoj: Háje, Chodov, Kunratice, Libuš, Modřany (+ Komořany), Lahovice, Velká Chuchle, Řepy, Nebušice, Lysolaje, Suchdol, Dolní Chabry, Ďáblice, Letňany, Čakovice, Kbely, Kyje, Horní Měcholupy, Dolní Měcholupy, Petrovice, Štěrboholy kaj ekde la 1-a de julio 1974 laŭ la leĝo n-ro 31/1974 Kol. jenaj vilaĝoj: Benice, Běchovice, Březiněvec, Dolní Počernice, Dubeč, Horní Počernice, Klánovice, Koloděje, Kolovraty (+ Lipany), Královice, Křeslice, Nedvězí, Satalice, Uhříněves (+ Hájek kaj Pitkovice), Újezd nad Lesy, Vinoř (+ Ctěnice), Cholupice, Lipence, Lochkov, Písnice, Přední Kopanina, Radotín, Řeporyje (+ Zadní Kopanina), Slivenec (+ Holyně), Stodůlky, Šeberov (+ Hrnčíře), Třebonice (+ Chabry), Újezd u Průhonic (+ Kateřinky), Zbraslav (+ Strnady, Peluněk), Zličín (+ Sobín).

## La historia evoluo de Prago

Arkeologiaj elfosaĵoj informas nin, ke sur la teritorio de Prago la homoj vivis jam en malfruaj tempoj de paleolitiko (600 000 - 40 000 a. K., trovejoj en Suchdol, Sedlec k. a.) kaj pli multnombre dum la lasta glaciepoko (40 000 - 10 000 a. K., trovejoj en Jenerálka, Juliska, Liboc, Libeň). La plej antikvaj terkulturistoj ekseтlis ĉi tie en la periodo de neolito (limo de la 5-a kaj 4-a jarmiloj a. K.) kaj poste sekvis seniterrompa vico de arkeologiaj kulturoj de eneolito kaj de bronzepoko (3 500 - 700 a. K.), la plejparto de la konstantaj setlejoj situis en la nordokcidenta parto de la nuntempa Prago (Bubeneč, Dejvice, Veleslavín, Šárka, Liboc, Troja). Ĉirkaŭ la j. 500 a. K. venis ĉi tien la kelta gento de Boioj kaj estigis ĉi tie altnivelan kulturon; ĉe la suda rando de Prago ili elkonstruis grandan urbospecan centron (opidumon) sur la monteto Hradistě super Závist. Laŭ ili la lando estis nomata Boi-hejmo - Bohemio. Sed poste ili cedis antaŭ la germana tribo de Markomanoj, poste en la 4-a kaj 5-a je. p. K. troviĝis ĉi tie Turingoj kaj Longobardoj.

En la 6-a jc. p. K. penetris sur la teritorion de la nuna Prago la slava gento de Ĉeĥoj, kies dinastio de Premislidoj dum la sekvintaj jarcentoj sinsekve unuigis la aliajn tribojn de ĉeĥoj kaj formis ĉi tie la ĉehan ŝtaton. (En la praa tempo de la ĉeĥa historio ekzistis unue la t.n. Regno de Samo - en la unua duono de la 7-a jc., poste Granda Moravio en la 9-a jc., kie regis la dinastio de Mojmiridoj, kaj nur fine de la 9-a jc. Bořivoj, la unua historie konata reganto el la dinastio de

Premislidoj, fondis norde de Prago en la loko nomata Levý Hradec (Maldekstra Kasteleto) la centran sidejon de Premislidoj kun masonita preĝejo, la unua kristana preĝejo en Bohemio, preĝejo de S-ta Klimento. Sed baldaŭ poste li transigis sian sidejon pli suden sur la monteto super la kurbiĝo de la rivero Vultavo, kaj tie li konstruigis fortikan setlejon, la ĝermon de la Praga kastelo, kiu poste fariĝis centro de la Ĉeĥa princlando. Nur iomete pli poste similan fortikigitan setlejon oni konstruis sude de la praga teritorio, sur la roko super la dekstra bordo de Vultavo. Tiu ĉi setlejo estis origine nomata Chrasten, sed pli poste Vyšehrad, kiu signifas "alte staranta kastelo".

Sed nun ni por momento forlasu la arkeologiajn sciigojn kaj ni turnu nin al la malnovaj ĉeĥaj legendoj, laŭ la latinlingva Ĉeĥa kroniko de Kosmas. Do laŭ la legendoj la tiama ĉeĥa reganto, la mitologia Přemysl (Premislo), la fondinto de la dinastio de premislidoj, kun sia edzino Libuše loĝis en Vyšehrad, ĉar la Praga kastelo tiam laŭ la legendo ankoraŭ ne ekzistis. Kaj foje promenante tra Vyšehrad la princino Libuše, dotita per profeta talento, ekstaris sur la roko super la rivero kaj, en tranco, komunikis sian majestan vizion de la estonteco: "Mi vidas grandan urbon, kies gloro tuŝos la stelojn. Tie en la arbaroj konstruu la urbon. Kiam vi venos tien, meze de la arbaro vi trovos viron, kiu konstruas sian domon. Sur tiu loko komencu konstrui la novajn kastelon kaj urbon." Kaj okazis tiel. Viroj tuj foriris al la montrita loko kaj tie ili trovis viron, ĉizantan sojlon de sia domo. Kaj pro la sojlo (ĉeĥe práh) la nova urbo ricevis la nomon Praha. Tiom la legendo.

La laŭlegenda etimologio de la nomo Praha estas de multaj fakuloj kontestata. Laŭ iuj vere temis pri sojlo, sed en la rivero (PIV: sojlo 5: Barforma altiĝo de rivera fundo), laŭ aliaj pri sekega loko (vyprahlý), kio en kazo de Prago ne estas vera, aŭ pri brunbruligita greno (Pražené) nomata "pražmo" /praĵmo/ aŭ pri faruno el tia bruligita greno, nomata prga aŭ prha. La etimologio de Praha / Prago ne estas ĝis nun klara.

La unua skriba mencio pri loko nomata "Fraganeo" troviĝas en aldono al la antikva astronomia verko de Boecio, devenanta el la jaroj 811 - 818 kaj nun konata kiel "Bavara geografo".

Araba komercisto Ibrahim ibn Jakub vizitis Pragon en la j. 965 kaj skribis, ke "la urbo Fraga estas konstruita el ŝtono kaj kalko, ĝi havas vivoplenan foirejon kaj estas ĉirkaŭita per ŝtona murego".

Kiel jam estis dirite, la unua historie konata ĉeĥa reganto princo Bořivoj konstruigis sur monteto super la rivero Vultavo fortikan burgon, kiu fariĝis centro de la ĉeĥa princlando. Iam post la j. 880 li konstruigis inter la remparoj de la burgo la unuan kristanan preĝejon de Maria Virgulino. En la j. 921 princo Vratislao apude konstruigis novan preĝejon de S-ta Georgo kaj en la j. 925 lia filo S-ta Venceslao grandan kvarabsidan rotondon de S-ta Vito.

Sub la kastelo, sur ambaŭ bordoj de Vultavo, dume kreskis la urbo. Tie kruciĝis la longdistancaj komercaj vojoj de nordo al sudo kaj de oriento al okcidento. La graveco de la urbo kreskis tiom, ke en la j. 973 princo Boleslao II. fondis tie episkopejon. (La unua episkopo fariĝis germano Thietmar, ĉeĥe nomata Dětmar /973 - 982/, la dua episkopo estis Vojteĥo /Adalberto, 982 - 997/.) Samtempe estis fondita la unua monaĥinejo de benediktaninoj ĉe la preĝejo de S-ta Georgo en la Kastelo kaj en la j. 993 fare de la episkopo Adalberto estis fondita dua monaĥejo en Prago - la konvento de benediktanoj en Břevnov.

Post la j. 1042 la Kastelo jam havis masonitajn muregojn anstataŭ la antaŭaj remparoj kaj en la j. 1060 princo Spytihněv II. ordonis konstrui vastan bazilikon de S-ta Vito sur la loko de la rotondo.

En la dua duono de la 11-a jc. princo Vratislao, kiu poste fariĝis la unua ĉeĥa reĝo, transigis sian restadejon al Vyšehrad, kie li konstruigis novan palacon, preĝejon de S-ta Petro kaj S-ta Laŭrenco, rotondon de S-ta Marteno kaj aliajn konstruaĵojn.

Sed cent jarojn poste princo Sobeslav I. revenis al la Kastelo kaj alikonstruigis tie la kastelan palacon kaj post la j. 1142 li alikonstruigis kaj pligrandigis la preĝejon de S-ta Georgo.

Samtempe kun la kresko de la Kastelo kreskis ankaŭ la urbo sub ĝi. Ĝia centro fariĝis vasta foirejo sur la loko de la nuna Malnovurba placo kaj apud ĝi ekestis dum la 12-a jc. princa doganejo Týn (Ungelt). Ĉirkaŭe estis konstruitaj multaj domoj, preĝejoj kaj monaĥejoj en la romanika stilo, kion ĝis nun atestas la tieaj keletaĝoj. (Nome la urbo tiam tre suferis pro oftaj superakviĝoj kaj tial, dum jarcentoj, oni altigis la stratojn kaj placojn de la urbo tiel, ke la iamaj teretaĝoj estas nuntempaj

keletaĝoj de la tieaj domoj.) En la jaroj 1232 -1234 estis finita la konstruado de la Malnova Urbo de Prago. Ĝi estis ĉirkaŭita per muregoj, kiuj ĉirkaŭis kaj en la Malnovan Urbon inkludis ankaŭ la domaron ĉirkaŭ la preĝejo de S-ta Gallo.

Sur la alia maldekstra bordo de Vultavo en la jaro 1257 reĝo Přemys1 Otakar II. fondis la Malgrandan Urbon de Prago. Ambaŭ urboj estis kunigitaj per ponto, unue ligna, poste ŝtona, nomata Judita ponto. Kaj ambaŭ urboj havis ankaŭ fortikajn remparojn.

La konstruado ene de la remparoj daŭris, sed jam en nova gotika stilo. De tiu tempo konserviĝis ekz. la monaĥinejo de klaraninoj de S-ta Agnesa, kun la preĝejo de S-ta Francisko kaj kapelo de Maria Virgulino, fondita en la j. 1233. Iam en la sama tempo estis konstruita la dunava Malnova-Nova sinagogo en la centro de la praga juda geto. La Malnova Urbo kreskis kaj en la j. 1299 reĝo Venceslao II. permesis al la urbestro kaj skabenoj aĉeti la domon de Jakub Kupka por la kunvenoj de la urba konsilantaro kaj por la oficejo de la urba skribisto. Praktike tio signifis, ke estis fondita la malnovurba urbodomo. De la j. 1310 estis uzata la plej malnova urba oficeja libro, Liber vetustissimus, kaj en la j. 1318 estas la unua mencio pri urbestro kiel ĉefo de la malnovurba konsilantaro. Tamen, kiel komencon de la Malnovurba urbodomo oni kutime indikas la jaron 1338, kiam reĝo Johano Luksemburga aprobis la aĉeton de la frugotika domo de Volflin por la bezonoj de la urbodomo. Apud la urbodomo oni konstruis turon sur romanika fundamento; en la j. 1402 en la turo aperis horloĝo, en 1409 sonorilo kaj iam en la sama tempo la astronomia horloĝo, konstruita de horloĝisto Mikuláš de Kadaň kaj plibonigita fine de la 15-a j. de magistro Hanuš. La domo de Wölflin baldau ne sufiĉis kaj oni aĉetis la apudan domom tíel, ke la Malnovurba urbodomo fariĝis nehomogena kompleksou de domoj, kiuj estis dum la paso de tempo aĉetataj kaj alkonstruataj laŭ la kresko de la signifo de la urbodomo.

La granda ekfloro de la Pragaj urboj komenciĝis dum la regado de imperiestro kaj reĝo Karolo IV., kiu celkonscie ŝanĝis Pragon en la reprezentam rezidejon de sia dinastio kaj en la imponan metropolon de la mezepoka roma regno. Li fondis la universitaton en la j. 1348, la unuan norde de Alpoj, grandstile li elmezuris kaj fondis la Novan Urbon de Prago (1348), li konstruigis dekojn da profanaj kaj ekleziaj konstruaĵoj, kiel la katedralon de S-ta Vito kun la kapelo de S-ta Venceslao, ŝtonan ponton (num nomatan Karola), Novurban urbodomon, Emaus-monaĥejon "Na Slovanech", la monaĥejon de S-ta Karolo la Granda en Karlov, la preĝejon de S-ta Apolinario, preĝejon de S-ta Henriko, de S-ta Stefano k. a. Prago de Karolo fariĝis superba gotika grandurbo, unu el la plej grandaj en la tiama Eŭropo, en kiu sur la areo de 8,1 km$^2$ vivis proks. 40 000 loĝantoj. Tiutempe kulminis ĉi tie ankaŭ la kultura disvolviĝo de la ĉeĥa lingvo kaj literaturo, de artisma disvolviĝo de la arĥitekturo, en kiu komencis aperi influo de la itala renesanco. En tiu tempo la ĉirkaŭaĵo de la Praga Kastelo fariĝis memstara urbo Hradčany. Ĝi estis estrata de la burggrafo de la Kastelo kaj ekde la j. 1592 ĝi fariĝis reĝa urbo.

Sed la kresko kaj disfloro de la kulturo unuflanke kaŭzis kreskon de gravaj socialaj antagonismoj, kiuj elvokis reformam movadon. La plej elstara reprezentanto de tiu movado fariĝis la universitata magistro kaj predikisto en la Betlehema kapelo Jan Hus (1372 - 1415). Post lia martira morto la reforma movado transformiĝis en revolucian husanan movadon, kiu komenciĝis per elĵeto de novurbaj skabenoj tra fenestroj surstraten, ĉar ili ne volis liberigi la enprizonigitajn malriĉulojn. Tiel okazis la t.n. la unua praga trafenestrigo 30. 7. 1419. La husana Prago forigis la potencon de la malnova ĉefe germana patriciaro kaj de la riĉiĝinta roma eklezio, konfiskis iliajn posedaĵojn kaj venkis la batalojn sur la monteto Vítkov kaj sub Vyšehrad (1420) kaj tiel frakasis la kruckavalirajn ekspediciojn de la reĝo Sigismundo.

Ankaŭ en la posthusana periodo (1434 - 1526) la praga nekatolika urbanaro retenis la akiritan havaĵon kaj la privilegian politikan pozicion en la frunto de la libera urba stato, t.e. urbanaro. En la Malnovurba urbodomo okazis kunvenoj de landaj deputitoj kaj ankaŭ elekto de la "husana" reĝo Georgo de Poděbrady (2. 3. 1458). Tiu ĉi reĝo kaj ankaŭ lia posteulo Vladislao II. Jagelono sidis plejparte en la Reĝa kortego en la Malnova Urbo. Tie, por la honoro de la reĝo, la urba konsilantaro decidis konstruigi majestan malfrurotikan Pulvan turon. Tiutempe estis finkonstruita ankaŭ la preĝejo de Di-Patrino antaŭ Týn (Týn-preĝejo), la nova remparo de la Praga Kastelo kaj alikonstruo de la reĝa palaco kun la granda tron-salonego (Vladislaa salonego) en la j.

1487 - 1502.

En la j. 1526 sur la ĉeĥa reĝa trono eksidis Habsburgoj kaj reĝo Ferdinando I. strebis likvidi la potencon de la Malnovurba urbodomo kaj li sukcesis post la malsukcesa insurekcio de ĉeĥaj evangeliaj statoj en la j. 1547. Ampleksaj konfiskadoj de havaĵoj, punpagoj kaj forigo de rajtoj kaj privilegioj de reĝaj urboj grave ekonomie malfortrgis Pragon, sed malgraŭ tio jam en la dua duono de la 16-a jc. venas periodo de rimarkinda revivigo de la ekonomio, kio ebligis intensivan renesancan alikonstruon de la urbo. La 2-an de junio 1541 katastrofa incendio grave damaĝis la Malgrandan Urbon, Hradčany kaj la Pragan Kastelon. Sed tio aktivigis la pragan loĝantaron al plua konstruado de la urbo. Venis investantoj, komercistoj, bankistoj kaj konstruestroj el Italio, Germanio kaj Nederlando kaj ankaŭ nobelaro, kiu sur la forbruligitaj lokoj kaj Liberaj parceloj komencis konstruigi novajn renesancajn urbajn palacojn, kiel tiu de Rožmberský, Lobkovický, Martinický, Smiřický k. a. Tio kulminis, kiam en la jaroj 1583 - 1612 la Praga Kastelo fariĝis konstanta rezidejo de la artama imperiestro Rudolfo II. Lian kortegon vizitis artistoj kaj scienculoj de la tuta Eŭroro. Ĉi tie aktivis la astronomoj kaj matematikistoj Tycho Brahe, Johannes Kepler kaj Joost Bürgi, pentro-artistoj Josef Heintz, Adrien de Vries, Hans van Aachen, Giuseppe Arcimboldo, Bartolomej Spranger, la poetino Alisbeta Joana Vestonia, la alkemiistoj John Dee aŭ Edward Kelley, aŭ la judaj scienculoj kiel rabeno Jehuda Löw, kiu inventis Golemon. La artaj kolektoj de l' imperiestro fariĝis famaj samkiel la riĉeco kaj la vigla vivo de la rapide kreskanta urbo sub la Kastelo. Tio ne ŝanĝiĝis, eĉ kiam la nova imperiestro Matiaso transigis la imperiestran rezidejon el Prago en Vienon.

Sed venis la dua insurekcio de la ĉeĥa nekatolika nobelaro kontraŭ Habsburgoj en la jaroj 1618 - 1620. Tiutempe okazis ankaŭ la dua Praga trafenestrigo, kiam reprezentantoj de la ribelanta ĉeĥa nobelaro eniris en la reĝan palacon de la Praga Kastelo kaj tie, en la Ĉeĥa kancelario, ili elĵetis tra fenestro la reĝajn gubernestrojn Jaroslav Bořita de Martinice kaj Vilém Slavata de Chlum kaj ilian skribiston Fabricius. Bonŝance ili fuĝis kaj post la malvenko de la nekatolika nobelaro en la batalo sur Blanka monteto (8. 11. 1620) ili revenis kaj Martínic akiris kaj nobelan titolon kaj ankaŭ sian iaman havaĵon. Kaj Slavata igis pentri bildon, sur kiu anĝeloj subtenas lin por mildigi lian falon. Tiam venis tre nalbona tempo por Prago.

La 27 estroj de la nobelara kontraŭhabsburga ribelo estis ekzekutitaj (senkapigitaj) sur la Malnovurba placo la 21-an de junio 1621. Memorigas tion tabulo sur la muro de la urbodoma turo kaj en la pavimo signita la ekzekutejo.

Persekutoj, elmigro de nekatolikoj, devigaj rekatolikigo kaj germanigo, rabado, epidemioj kaj aliaj teruraĵoj de la tridekjara milito duonigis la nombron de la praga loĝantaro. La transigo de la imperiestra kortego kaj de aliaj gravaj oficejoj en Vienon degradis Pragon al nura provinca urbo. Tiun malfavoran tempon de la ĉeĥa historio kaj ankaŭ de la ĉeĥa lingvo oni ĝenerale nomas "1a tempo de obskuro".

Malgraŭ tio, en la jaroj 1623 - 1630 la imperiestra generalissimus Albrecht de Valdštejn (Wallenstein) konstruigis sur la loko de 26 urbaj domoj en la Malgranda Urbo sian grandan urban rezidejon Wallenstein-palacon kun artisme aranĝita ĝardeno. Kaj ekde tiam seninterrompe daŭris la konstruado de dekoj da nobelaj palacoj kaj de monaĥejoj kaj preĝejoj de la repotenciganta katolika eklezio. Post granda incendio en la Malnova kaj Nova Urboj oni komencis konstrui kaj modernigi grandan nombron de domoj de urbanoj. Komencis aperi konstruaĵoj en la nova stilo "baroko", sublimaj riĉe ornamitaj palacoj de aristokratoj, kiel Černínský, Nostický, Šternberský, Lobkovický, Toskánský, Thunovský, Colloredo-Mansfeldský, Kinský kaj multaj aliaj kaj ankaŭ imponaj templaj konstruaĵoj, kiel S-ta Nikolao en Malgranda Urbo, S-ta Nikolao en la Malnova Urbo, S-ta Ignacio, S-ta Francisko, S-ta Margareta k.a. La kadron de la urbo formis potencaj barokaj remparoj, kronitaj per la citadelo de Vyšehrad. Ĝi protektis Pragon antaŭ la konkero fare de svedoj ĉe la fino de la tridekjara milito (1648), sed ne antaŭ la franca-bavara armeo (1741) kaj prusoj (1744) dum la militoj pro la aŭstria heredaĵo.

Per dekreto de imperiestro Jozefo IIa de la 12-a de februaro 1784 la ĝis tiam kvar memstaraj pragaj urboj - Malnova Urbo, Nova Urbo, Malgranda Urbo kaj Hradčany - estis unuigitaj en unu tuton, en la urbon Prago. Baldaŭ poste komencis kreski la unuaj industriaj antaŭurboj ekster la urbaj

muregoj (Karlín, Smíchov, Holešovice, Libeny). Kun la kresko de fabrikoj kreskis ankaŭ la laborista movado kaj kun ĝi ankaŭ la patriotisma naciliberiga movado, kiu sukcese superis la dekadencon de la ĉeĥa lingvo kaj de la nacia kaj ŝtata konscio el la tempo de obskuro post la malvenko en la batalo sur Blanka monteto. Prago denove komencis fariĝi moderna kultura urbo. Aperis konstruaĵoj de teatroj (ekz. en la Nostic-teatro okazis en la j. 1787 la monda premiero de la opero Don Giovanni de W. A. Mozart), en 1868 estis metita la angulŝtono de la ĉeĥa Nacia teatro, aperis konstruaĵoj de Nacía muzeo, de Rudolfinum (t. e. Domo de artistoj), de Komunuma domo, de Nova urbodomo. Apud la kreskanta ĉeĥa literaturo estiĝis en Prago aparta german-juda kulturo, reprezentita de F. Kafka, R. M. Rilke, F. Werfel, G. Meyrink, E. E. Kisch, sed ankaŭ de G. Mahler, E. Mach, A. Einstein, kiuj dum kelkaj jaroj laboris ĉi tie.

Sed la modernigo de Prago havis ankaŭ negativan efikon. Post la j. 1893 okazis la t. n. asanigo, dum kiu estis likvidita granda parto de la historia Malnova Urbo kaj preskaŭ la tuta Juda Urbo. Aliflanke la malkonstruo de la urbaj remparoj (komencita en 1874) kaŭzis, ke la ĝis tiam apartigitaj antaŭurboj unuiĝis kun la interna urbo en unu urban komplekson.

La 28-an de oktobro 1918 Prago fariĝis la ĉefurbo de memstara Ĉeĥoslovaka respubliko. La 1-an de januaro 1921 estis al la ĉefurbo alligitaj ĉirkaŭaj urboj kaj vilaĝoj kaj la grandeco de la urbo kreskis ankaŭ interne, per multaj konstruaĵoj en la modernaj stiloj, kiel la modernismo, funkcionalismo, konstruktivismo, monumentalismo kaj aliaj.

Kaj kion pri la posta historio de Prago? Venis la germana okupacio de Prago (15. 3.1939), la kontraŭfaŝisma rezisto, kiu kulminis per la insurekcio la 5. 5. 1945, la komunista renverso en februaro 1948, la "Praga printempo" 1968 kaj la nova okupacio 21. 8. 1968, kiun sekvis la komunista "normaligado" kaj kiu finiĝis per la "Velura revolucio" post la 17. 11. 1989. La 1-an de januaro 1993 la tiama Ĉeĥoslovakio malkomponiĝis kaj Prago fariĝis ĉefurbo de Ĉeĥa respubliko. Kaj tio ne plu estas historio, tio estas la nuntempo.

## La Praga Kastelo

La 1-a (honora) korto: pordego kun statuoj de luktantaj gigantoj (kopioj de Č. Vosmík kaj A. Procházka laŭ originalaj plastikaĵoj de Ignác Platzer el la j. 1768). La korto estas la plej nova parto de la Kastelo, konstruita en la j. 1756-1774 laŭ planoj de Nicola Pacassi.

La Matias-pordego (el la j. 1614 de Giovanni M. Filippi) estas la unua sekulara baroka konstruaĵo ĉe ni.

La 2-a korto: baroka fontano, farita de Francisko de Torre kun plastikaĵoj de Jeroným Kohl (1686),

puto kun fera kovraĵo (el la 17-a jc.),

la kastela kapelo de S-ta Kruco konstruita de Anselmo Luragho en 1753, kun statuoj de S-taj Petro kaj Paŭlo de E. Max (1854) - tie troviĝas kolekto de kastelaj juveloj,

en la norda alo de la kastelo troviĝas la Hispana solonego kaj Galerio.

La 3-a korto: la gotika katedralo de S-ta Vito (sur la loko de rotondo de S-ta Vito el 927 kaj de romanika baziliko fondita post 1060 de princo Spytihěv kaj en 1096 finkonstruita de Vratislao II.), fondita en 1344 de Karolo IV., projektita kaj konstruita ĝis 1352 de Matiaso de Arras, poste de Petro Parler kaj de liaj filoj, sed dum la husana periodo la konstruado estis interrompita kaj finita nur inter 1860 kaj 1929, fare de arkitektoj Josef Kranner, Josef Mocker kaj Kamil Hilbert. La templo estas 60 m longa, 46 m larĝa kaj 46 m alta. El la kapeloj la plej grava estas la Sankt-venceslaa kapelo, konstruita de Petro Parler en la j. 1362 - 1367 super la tombo de S-ta Venceslao sur la loko de la iama rotondo de S-ta Vito. En la angulo de la kapelo troviĝas pordo al kamero super la t.n. Ora pordego, kie estas deponataj la reĝa krono kaj aliaj kronjuveloj de la ĉeĥa lando.

La ĉefa altaro estas novgotika el marno, el la j. 1868 - 1873 laŭ projekto de J. Kranner.

Antaŭ ĝi troviĝas la reĝa tombo (maŭzoleo), renesanca verko el blanka marmoro el la j. 1564 - 1589, ornamita per statuoj kaj reliefoj de nederlanda skulptisto Alexander Collin; tie estas enterigitaj Ferdinando I., lia edzino Anna Jagelona kaj filo Maksmiliano II.

En kapelo de S-ta Kruco estas eniro en la tombokripton de ĉeĥaj reĝoj. Tie troviĝas sarkofagoj de ĉeĥaj reĝoj Karolo IV., Venceslao IV., Georgo de Poděbrady k. a.

La okcidentan flankon de la templo formas du 83 m turoj, konstruitaj fine de la 19-a jc., kaj la ĉefa pordego, ĉe la suda flanko troviĝas la granda turo, fondita en 1396 de Petro Parler, en 1770 finita per bulbo-forma tegmento fare de Nicola Pacassi. En la turo pendas la plej granda sonorilo en Bohemio nomata Zikmund (Sigismundo, pezo 17 t, 2 m alta, 2,56 m diametre), farita en 1548 de Tomáš Jaroš. Sub la turo troviĝas la t.n. Ora pordego, super ĝi la kamero kun la reĝaj kronjuveloj. Sur la muro gotika mozaiko, farita de veneciaj artistoj en la j. 1370-1371 kaj prezentanta la Lastan juĝon kun Kristo.

Baroka konstruaĵo de la malnova prepostejo, kiu estas alikonstruita romanika palaco de episkopo.

Monolito el granito de Mrákotín 18 m alta, starigita en 1928 kiel monumento al la viktimoj de la unua mondmilito.

Rajdstatuto de S-ta Georgo, verko de Georgo kaj Marteno de Cluj el la j. 1373, remuldita post la j. 1562 de Wolf Hofprucker kaj Tomáš Jaroš.

La Sudan flankon de la 3-a korto formas longa konstruaĵo de kastelaj palacoj kovritaj per unueca rokoka fasado projektitaj de Nicola Pacassi kaj realigitaj de Anselmo, Lurago, kovranta la renesancajn kaj frubarokajn konstruaĵojn.

Pli oriente sub la fasado de Pacassi troviĝas la mezepoka reĝa palaco, konstruita sur la loko de la malnova palaco de Premislidoj en la 14-a jc. fare de Karolo IV. kaj Venceslao IV. kaj alikonstruita fine de la 15-a jc. dum la regado de Vladislao Jagelono. Tie troviĝas la Vladislaa salonego 62 m longa kaj 13 m alta, la malnova ĉambro de deputitoj, kaj la preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj, konstruita de Petro Parler en la j. 1370 - 1387 kaj post la incendio en 1541 nur en la j. 1570 - 1574 renesance alikonstruita.

Instituto de nobelinoj, fondita de Maria Tereza, konstruita de Anselmo Luragho laŭ plano de Nicola Pacassi en la j. 1755.

Lobkovický-palaco, konstruita en la 2-a duono de la 16-a jc. en la stilo de la itala renesanco, poste kelkfoje alikonstruita. Tie troviĝas la historia ekspozicio de Nacia muzeo.

La malnova burggraf-domo – tie loĝis la plej alta burggrafo de la Praga Kastelo, kiu estis la plej alta landa oficisto kaj iasence vic-reĝo.

Preĝejo de S-ta Georgo, romanika baziliko origine konstruita antaŭ la j. 920, sed en la j. 973 princo Boleslao II. kun sia fratino Mlada fondis tie la unuan monaĥinejon de benediktaninoj kaj la bazilikon oni malkonstruis kaj sur la sama loko estis konstruita trinava baziliko antaŭromanika (otona). En la j. 1142 la preĝejo parte brulruiniĝis kaj estis alikonstruita al trinava romanika baziliko kun du turoj. Poste ĝi estis pligrandigita, en la 17-a jc. estis konstruita frubaroka fronto de la preĝejo kaj en la j. 1718 - 1722 estis alkonstruita al la suda flanko la kapelo de S-ta Johano Nepomuceno. En 1782 la monaĥinejo estis likvidita kaj ŝanĝita en kazernon, nun estas tie ekspozicio de la ĉeĥa baroka pentroarto de la Nacia galerio.

La Ora strateto - laŭ la muregoj super la Cerva fosaĵo. Tie estas vico da etaj dometoj, en kiuj ĝis 1597 loĝis la kastelaj pafistoj kaj eble ankaŭ orĉizistoj.

En la orienta flanko de la Ora strateto troviĝas Daliborka, la turo de la malfrugotika remparo de Vladislao Jagelono, la turon konstruis en 1496 Benedikt Rejt el Pistov (Ried el Piesting) kaj ĝi servis kiel malliberejo kaj ĝi estas nomata laŭ la unua malliberulo kavaliro Dalibor de Kozojedy.

En la okcidenta flanko de Ora strateto estas la Blanka turo, parto de la remparo kaj ankaŭ ĝi servis kiel malliberejo. Pluaj turoj estas la kaj Mihulka.

Sub la suda flanko de la Kastelo troviĝas la t.n. Sudaj ĝardenoj de la Praga Kastelo: Vrtbovská, Ledeburská, Pálfyovská, Kolovratská, barok-stile aranĝitaj kaj nomataj laŭ palacoj, sub kiuj ili troviĝas.

El la 2-a korto de la Kastelo tra la t.n. Pulva ponto oni povas veni al la Reĝa ĝardeno, kiu de la Kastelo estas dividita per la Cerva fosaĵo. La Polva ponto nun ne plu estas ponto, sed dum jarcento farita terŝutaĵo, taluso.

Maldekstraflanke tie troviĝas la iama rajdejo, konstruita ĉirkaŭ 1694 de Johano Baptisto Mathey; la 92 m longa konstruaĵo nun servas kiel ekspoziciejo.

Dekstre etendiĝas la Reĝa ĝardeno, ĉe kies komenco troviĝas Leona aŭ Ursa korto, fondita

de Ferdinando I. Kaj ĝis 1740 estis tie bredataj sovaĝaj bestoj, nun estas tie restoracio. Apude staras la t.n. prezidenta dometo, la iama ĝardenista dometo, pligrandigita antaŭ 1938 por la bezonoj de prezidento de la respubliko,

plue situas la t.n. Granda pilkludejo, renesanca konstruaĵo farita de Bonifacio Wohlmuth kaj Andreo Avostalis en la jaroj 1567 - 1569, kun areo de 40 x 10 m, nun ĝi servas kiel reprezenta salonego por la prezidento de la respubliko.

La Reĝa ĝardeno estis multfoje rearanĝata kaj plibonigata, apartan atenton meritas la ĝardeneto, en kies centro staras la bronza "kantanta" fontano, verko de skulptisto Francisko Terzio, kiun muldis en la j. 1564-1568 Tomáš Jaroš laŭ la modelo de Hans Peysser kaj Giovanni A. Brocco.

La plej bela renesanca konstruaĵo en la Reĝa ĝardeno estas la Reĝina Kasteleto, kiun imperiestro Ferdinando I. dediĉis al sia edzino reĝino Anna. Konstruis ĝin en la jaroj 1535 - 1563 italaj artistoj Johano Spatio kaj Joan Maria de Pambio laŭ la modelo de Paollo della Stella, sed la finan aspekton donis al ĝi Hans Tirol kaj Bonifacio Wohlmuth, kiuj finis la konstruadon en la j. 1557 - 1563. Intere la kasteleto estis belege aranĝita precipe dum la regado de Rudolfa II., sed dum la regado de Jozefo II. ĝi estis transformita al armea laboratorio. En la 19-a jc. ĝi estis renovigita, en la j. 1851 - 1865 ĝi estis ornamita per bildoj el la ĉeĥa historio laŭ Christian Ruben kaj nun ĝi servas kiel ekspoziciejo.

## Hradčany

Hradčany estas la kvara praga urbo establita apud la Praga Kastelo. (Pli frue la Praga Kastelo mem estis nomata Hradčany.) Iaspecan antaŭkorton de la Praga Kastelo formas la Hradčany-placo, kiu estas ĉirkaŭata de imponaj renesancaj kaj barokaj palacoj.

La orientan flankon de la placo formas la Praga Kastelo.

Tuj apude - ĉe la norda flanko de la placo tuj apud la Kastelo situas la ĉefepiskopa palaco, baroka konstruaĵo kun rokoka fronto, realigita en la jaroj 1764 - 1765 laŭ projekto de J. J. Wirch. La kerno de la palaco estas malnova renesanca domo de Gryspek, dediĉita de Ferdinando I. al la praga ĉefepiskopo Antonín Brus el Mohelnice kaj en la j. 1669-1694 barokstile alikonstruita de Johano Bapt. Mathey.

Tra la trairejo apud la ĉefepiskopa palaco estas atingebla la Šternberk-palaco. Ĝi estas valora pintbaroka konstruaĵo, konstruita en la j. 1698 - 1730 de Johano Bapt. Alliprandi kaj J. Santini laŭ projekto de Dominiko Martinelli. Nun ĉi tie estas Nacia galerio, kiu prezentas tie ne nur la ĉeĥan pentroarton, sed ankaŭ kolektora de pentraĵoj italaj, hispanaj, germanaj, nederlandaj, flandraj kaj francaj.

En la okcidenta angulo de la norda flanko de la Hradčany-placo situas Martinický-palaco, la renesanca konstruaĵo el la 3-a kvarono de la 16-a j.c, fare de Andreo Teyff el Kinsdorf.

La okcidentan flankon de la placo formas la palaco Toskana (Thun-Hohenŝtejna); ĝi estas fiera kontrauaĵo de la Praga Kastelo, frubaroka palaco konstruita en la j. 1685-1691; nun ĝi servas kiel reprezenta konstruaĵo de Ministerio de eksterlandaj aferoj.

Ĉe la suda flanko staras la preĝejo de S-ta Benedikto.

Apude staras du Schwarzenberg-palacoj. La pli granda estas nun sidejo de la Armea historia muzeo. Temas pri monumenta renesanca palaco konstruita 1555-1576 de Agostino Galli sur loko de 4 nobelaj domoj, ĝi konsistas el tri aloj kun honora korto kaj pordego, kies muroj estas ornamitaj per sgrafitaj rustikaĵoj. La apuda malpli granda Schwarzenberg-palaco nomäta ankaŭ Salmovský-palaco ricevis sian nunan klasikisman aspekton en la j. 1810-1811 fare de arkitekto Fr. Pavíček. Nun estas tie la ambasadorejo de Svislando.

En la centro de la placo staras kolono de Maria Virgulino, konstruita en 1726 danke pro evito de la pesto en la j. 1713. la statuo de Maria Virgulino kune kun statuoj de ok sanktuloj kaj blazono de la Malnova Urbo de Prago estas verkoj de F. M. Brokoff.

Ĉe la angulo de la malpli granda Schwarzenberg-palaco, vid-al-vide al la Praga Kastelo, estis en la j. 2001 instalita statuo de T. G. Masaryk, la fondinto de la Ĉeĥoslovaka respubliko kaj la unua prezidento de Ĉeĥoslovakio, okaze de 150 jaroj ekde lia naskiĝo.

Tra Loreta-strato, kie troviĝas interesaj konstruaĵoj, kiel la iama urbodomo de Hradčany aŭ

la baroka Ditrichštejn-palaco, oni venas al la Loreta-placo, kie ĉe la orienta flanko troviĝas Loreto. En la centro de Loreto estas kopio de Sankta kabano en la itala Loretto, konstruita en 1626-1631 de Johano Bapt. Orsi, post la j. 1661 estis konstruita ambito, preĝejo de la Naskiĝo de l' Sinjoro en la j. 1734-1735 sub estrado de Johano Georgo Aichbauer, en la okcidenta ambito estas juvelejo, kie troviĝas la Loreta trezoro, - kolekto de liturgiaj vazoj, pokaloj, monstrancoj kaj ornatoj de la 16-a ĝis la 18-a jc. En la fronta turo troviĝas kariljono de horloĝisto Petr Neumann el la. j. 1694.

En la kontraŭa flanko de la Loreta placo etendiĝas la monumenta Černín-palaco, la Ministerio de eksterlandaj aferoj. La konstruaĵon mendis Humprecht Černín de Chudenice, la imperiestra legato en Venecio. Ĝi estis konstruita laŭ planoj de la itala arkitekto Francisko Caratti laŭ la renesanca stilo en la jaroj 1669-1692; la konstruestroj estis Caratti mem kaj post lia morto Johano de Capauli kaj Abraham Leuthner. La fronto de la palaco estas 150 m longa kaj enhavas 30 duonkolonojn.

En la norda flanko de la placo situas la iama kapucena monaĥejo kun la preĝejo de Maria Virgulino konstruita en la j. 1600-1602. Dum Kristnasko estas tie ekspoziciata kristnaska kripo kun figuroj de homa grandeco.

Post la Černín-palaco, situas Pohořelec, iam antaŭurbo de Hradčany, fondita en 1375 de vicburggrafo Aleš de Malkovice. La centron de Pohořelec formas placo el du vicoj da domoj, el kiuj bela estas la Kučera-palaco, rokokstila konstruaĵo el la j. 1775-1780. Okcidente de la placo staris domo, en kiu loĝis kaj en la j. 1601 mortis la dana astronomo Tycho Brahe. Proksime de tiu loko nun staras monumento de du gravaj astronomoj Tycho Brahe kaj Johannes Kepler.

Strahov-monaĥejo estas ampleksa konstruaĵ-komplekso, konsistanta el preĝejo, monaĥejo, abatejo kaj konstruaĵo de biblioteko. La monaĥejo estis fondita en 1140 de princo Vladislao II. laŭ instigo de episkopo de Olomouc Jindřich Zdík. La princo invitis ĉi tien monaĥojn de la premonstrata ordeno el la monaĥejo en Steinfels. Dum jarcentoj la monaĥejo estis alikonstruata, pligrandigata kaj barokigata, inter la j. 1782 - 1797 estis konstruita la biblioteko. La preĝejo de S-ta Rochus estis konstruita en la stilo de malfrua gotiko en la j. 1603-1612, la abata templo de Ĉieliro de Maria Virgulino estas trinava baziliko, kies fundamento estas romanika baziliko el la 12-a jc., la transversa navo estas gotika, la altarejo renesanca, ambaŭ turoj el la mezo de la 18-a jc., de tiu tempo estas ankaŭ la statua ornamaĵo de la ĉefa fronto de J. A. Quintainer. En la monaĥejo troviĝas nun la Muzeo de la ĉeĥa literaturo.

En la direkto al Petřín estas maldekstraflanke videbla la parto de la mezepoka remparo de Prago, la t.n. Malsata muro, konstruigita de Karolo IV. Konstruita el marno, ĝi estas 6 m alta, 2 m dika kaj fortikigita per prismoformaj turoj. La interna flanko de la muro estas finita per krenelaro.

## Malgranda Urbo

En Neruda-strato rimarkinda estas la palaco Morzinský (rumana ambasado), baroka konstruaĵo kun statuoj de F. M. Brokoff, kaj la palaco Thun-Hohenštejnský (itala ambasado) kun statuoj el laborejo de Matiaso Braun; konstruita en la j. 1710-1720 laŭ planoj de Johano Santini. Unu el la posedantoj estis Vilém Slavata de Chlum, la trafenestrito. Apude troviĝas la preĝejo de Maria Virgulino de Konstanta Helpo, kiun en la j. 1691 - 1717 en la stilo de la itala baroka klasikismo konstruigis la ordeno de theatenoj, nomataj ankaŭ gaetanoj. Super la preĝejo estas baroka konstruaĵo de la iama monaĥejo. En la jaroj 1834 - 1837 en la manĝejo de la monaĥejo okazis ĉeĥlingvaj teatraj prezentadoj (teatreto en la Gaetana domo), kiujn organizis J. K. Tyl, kaj kie ludis ĉeĥaj patriotoj kiel Jos. Jiří Kolár, K. Sabina, K. H. Mácha, B. Jablonský k. a.

La centron de la Malgranda urbo formas la Malgrandurba placo. Ĝian orientan flankon formas la Lichtenštejn-palaco, konstruita en 1791 en la klasikisma stilo laŭ projekto de Matias Humml. En la norda flanko staras la iama jezuita gimnazio, baroka konstruaĵo el la komenco de la 18-a jc., plue la domo Smiřický (nomata ankaŭ U Montágů), post la j. 1603 renesance alikonstruita, kaj la Šternberk-palaco, konstruita surloke de forbruligitaj domoj fine de la 17-a jc. En la j. 1770 grafo kune kun aliaj ĉeĥaj scienculoj fondis tie la Reĝan societon de sciencoj.

La okcidentan flankon formas la iama Malgrandurba urbodomo, renesancstile alikonstruita

en la j. 1617 - 1622 versimile de Johano Lampion de Bossi, poste troviĝis tie Malostránská beseda, do iaspeca Malgrandurba kulturdomo. Apude estas la domo U Petzoldů, la iama Kaiserštejn-palaco, bela baroka konstruaĵo.

La Sudan flankon de la placo formas domoj Ĉe verda arbo (U Glaubicŭ) kaj La ruĝa cervo - ambaŭ havas belan klasikisman fasadon, kaj la palaco Hartigovský (aŭ Glauchovský kaj Senftenberský).

En la centro de la Malgrandurba placo situas la templo de S-ta Nikolao, la pinta konstruaĵo de la ĉeĥa baroko. Sur tiu loko estis jam malnova gotika preĝejo de S-ta Nikolao, konstruita baldaŭ post la fondo de la Malgranda urbo. Jezuitoj malkonstruis ĝin kaj vicon da domoj kaj sur tiu ĉi loko ili ekkonstruis la novan preĝejon. Sed la malgrandurba komunumo longe rezignis kaj ne permesis al jezuitoj konstrui. Tial ili povis ekkonstrui la novan preĝejon nur en la j. 1703 laŭ planoj de nekonata arkitekto sub gvido de Kristoforo Dienzenhofer, poste la konstruadon gvidis Kilián Ignác Dienzenhofer laŭ propraj planoj kaj li finis la konstruadon en la j. 1752. Post li Anselmo Luragho konstruigis la sonorilturon kaj per tio en 1755 la konstruado estis finita. La preĝejo estas ununava baroka konstruaĵo kun altarejo kaj kvar paroj de kapeloj, kun granda kupolo kaj svelta sonorilturo.

Alia grava placo de la Malgranda Urbo estas la Wallenstein-placo, kies orientan flankon formas monumenta barokstila konstruaĵo de Wallenstein-palaco. Konstruigis ĝin Albrecht Václav Eusebius Valdštejn, kiu por tiu celo aĉetis 23 domojn, 3 ĝardenojn kaj urban brikfarejon sub la Kastelo; inter la j. 1623-1628 laŭ projekto de Andreo Spezza kaj Nikolao Sebregondi konstruis ĝin Johano Marini, Zakario Bossi de Campione kaj Vincento Bocaccio estrataj de Johano Pieroni kaj kun Baccio Bianco. La palaco havas 5 kortojn kaj grandan. ĝardenon. En la palaco estas granda salonego, kiu ampleksas du etaĝojn de la maldekstra flanko de la ĉefkonstruaĵo; en la salonego okazis la Komeniologia konferenco en la j. 1992, dum la antaŭkongreso de la UK en Vieno. La ĝardenon fermas la t.n. salla terrena, konstruita antaŭ 1627 laŭ projekto de Johano Pieronni; tie okazas somere teatraj prezentadoj kaj koncertoj.

Alia placo de la Malgranda Urbo estas la Maltana placo kun multaj barokaj nobelaj palacoj kaj konstruaĵoj de maltaj kavaliroj kaj de la malta grandprioro.

La preĝejo de Virgulino Maria la Venka (origine la preĝejo de S-ta Triunuo) estis konstruita en la j. 1611-1613 por la germanaj luteranoj, sed post la blankmonteta malvenko donacis ĝin imperiestro Ferdinando II. al karmelanoj. Ili konstruigis monaĥejon kaj la preĝejon ili konsekris al Virgulino Maria la Venka honore al la venko sur la Blanka monteto; la konstruado daŭris ĝis 1654. La interno de la preĝejo estas simpla, renesanca, sed kun riĉe ornamitaj frubarokaj altaroj. Sur la meza altaro dekstre troviĝas la mondfama Praga Jezuinfano el la j. 1628.

La monaĥejo kun preĝejo de S-ta Tomaso estis konstruita sur la loko de samnoma preĝejo de post la j. 1285. Reĝo Venceslao II. invitis en Pragon la ordenon de aŭgustenanoj, al kiu li donacis la parcelon ĉe la urba murego. La aŭgustenanoj konstruis novan preĝejon (konsekrita en 1379) kaj ĉe ĝi monaĥejon kaj bierfarejon. Post kelkaj incendioj la origine gotika preĝejo estis alikonstruita barokstile sub Kilián I. Dienzonhofer.

La preĝejo de S-ta Jozefo estas baroka konotruaĵo el la j. 1686 - 16929 laŭ projekto de Abraham Parigi. Apude estas monaĥinejo, konstruita 1657 -1672; tie estis nudpiedaj karmelaninoj, post la malfondo de la monaĥinejo em 1782 ili foriris, sed tuj unu jaron poste eksidis tie ordeno de anglaj virgulinoj. Post la j. 1918 la konstruaĵo fariĝis posedaĵo de la ĉs. ŝtato; tiam oni alkonstruis aliajn ampleksajn konstruaĵojn, kiuj fariĝis Ministerio de financoj.

La iama monaĥineja preĝejo de Maria Magdalena ekzistis jam antaŭ la husanaj militoj, post 1606 dominikanoj surloke konstruigis novan preĝejon laŭ planoj de Fr. Carrati, konstruestroj Johano de Capauli kaj post li Kristoforo Dienzenhofer, finkonstruita en 1708. Post la malfondo de la monaĥejo ĝi estis alikonstruita al poŝtdirektorejo, poste al ĝendarma kazerno, nun troviĝas tie la Ŝtata centra arĥivo, la preĝejo ne plu ekzistas. Sed grave estas, ke en la preĝejo estis entombigitaj Kristoforo Dienzenhofer (1655 - 1722) kaj lia filo Kiliano Ignacio (1690 - 1752), la plej gravaj arkitektoj de la praga baroko.

Tyrš-domo. Ĉi-loke en la 14-a jc. troviĝis monaĥinejo de dominikaninoj ĉe S-ta Anna, antaŭ 1587 ĉi-loke estis renesanca kasteleto de Jan St. Vchynský de Vchynice, laŭ plano de Andreo

Avostalis, en 1623 la domon aĉetis la militriĉiĝinto Pavel Michna de Vacinov, kiu konstruigis grandan domon dum lia filo Václav Michna en la j. 1640 - 1650 alkonstruigis malantaŭan celon en la stilo de la norditalia malfrua renesanco, poste la palaco fariĝis ŝtata posedaĵo kaj armea armilejo, post la j. 1918 la domon aĉetis la gimnastika organizaĵo Sokol, kiu adaptis la palacon por la gimnastikaj celoj kaj en la malantaŭa korto oni alkonstruis novan gimnastikejon. La palaco ricevis la nomon Tyrš-domo kaj en la antaŭkorto staras la monumento de d-ro Miroslav Tyrš, la fondinto de Sokol, de skulptisto Lad. Šaloun.

Super la Malgrandurba placo, en la strato Sněmovní (Parlamenta str.) troviĝas la deputita ĉambro de la ĉeĥa parlamento. Iam ĝi estis palaco de grafo Thun, konstruita en j. 1696 - 1720 sur loko de kvin domoj. En novembro 1918 estis ĉi tie sentronigita la dinastio Habsburga-Lotaringa, proklamita la Ĉeĥoslovaka respubliko, elektita la unua prezidento T. G. Masaryk kaj proklamita la 8-hora labortempo.

Kampa estas insulo, kiun formas la rivero Vultavo kaj la riverbranĉo Čertovka. Ĉi tie estis ĝardenoj, nur en la 2-a duono de la 16-a jc. oni komencis konstrui tie. Troviĝas tie historiaj domoj kaj palacoj, ekz. Lichtenštejnský, aŭ Sovovský-muelejo, lastatempe alikonstruita al galerio. Sur la placo de Kampa ekde la j. 1606 okazas ĉiujare pot-foiroj. En aŭgusto 2002 Kampa estis subakvigíta. Sur la bordo de Čertovka estas videbla la granda mueleja rado de la Štěpánovský- aŭ Velkopřevorský-muelejo.

<u>Karola ponto</u>

Karola ponto kunligas la du bordojn de la rivero Vultavo kaj la du historiajn urbojn de Prago, la Malgrandan Urbon kaj la Malnovan Urbon. Sur ambaŭ flankoj de Karola ponto troviĝas pontoturoj.

Ĉe la flanko de Malgranda urbo troviĝas du turoj, la Malgrandurbaj pontoturoj. La malalta pontoturo estas esence romanika, ĝi estas restaĵo de la maldekstraborda fortikaĵo el la komenco de la 12-a jc. kaj estas pli aĝa, ol estis la tiea Judita-ponto. En la turo havas sidejon la Klubo por la Malnova Prago. La ekstera aspekto de la turo devenas de la renesanca riparo el la jaro 1591.

Antaŭ la turo staras la t.n. doganejo, alikonstruita tiel, kiel ĝi nun aspektas, en 1591. En la konstruaĵo troviĝis la oficejo de la Praga ponto kaj la imperiestra sal-oficejo. En la supra etaĝo troviĝas rara verko de la ĉeĥa malfruromanika skulpto-arto el la 12-a jc., la votiva reliefo, prezentanta surgenuantan junulon, antaŭ la tronsidanta reĝo, verŝajne la konstruiston de la Judita-ponto antaŭ Vladislao I.

La pli alta pontoturo estis konstruata en 1464 kaj postaj jaroj kaj estis financita de Georgo de Poděbrady. Verŝajne ĝi staras sur loko de malnova romanika turo. Laŭ la arkitektura aspekto ĝi imitas la Malnovurban turon de Parler.

La Malnovurba pontoturo estas la plej bela mezepoka turo en Eŭropo kaj la plej impresanta konstruaĵo de la Kruckavalira placo. La orienta flanko de la turo estas riĉe arkitektura aranĝita kaj skulpture ornamita. En la suba parto de la turo, super la pordego, troviĝas blazonoj de landoj de la regno de Karolo IV, kaj motivoj de alciono en vualo, la simbolo de Venceslao IV. En la unua etaĝo estas statuoj de la patrono de la ponto S-ta Vito kaj statuoj de Karolo IV. kaj de Venceslao IV., kaj supre la statuoj de la patronoj de la ĉeĥa lando - de S-ta Adalberto (Vojteĥo) kaj de S-ta Sigisnundo. La okcidenta flanko estis damaĝita per pafado de svedoj en la j. 1648. La turo estis konstruita fine de la 14-a kaj komence de la 15-a jc. laŭ projekto de la konstruestro Petro Parler kaj faris ĝin la konstruantoj de la templo de S-ta Vito.

Grava alikonstruo de la turo okazis en la jaroj 1874 - 1875 fare de arkitekto Josef Mocker. Sub la turo troviĝas keloj, kiuj iam servis kiel malliberejo, samkiel la ejoj en la turo. Sur muroj tie troviĝas surskriboj de la iamaj malliberuloj.

En la turo estas ŝtuparo, laŭ kiu oni povas ascendi en etaĝojn, de kie estas belega rigardo al la ponto kaj al la Praga Kastelo.

La unua ŝtonponto en Prago estis konstruita en la 60-aj jaroj de la 12-a jc. fare de reĝo Vladislao I. kaj estis nomita laŭ lia edzino Judita ponto. Ĝi estis konstruita laŭ la modelo de la ponto en Regensburgo kiel dua tia ponto en la centra Eŭropo. Ĝi estis malalta, konforme al la romanika

horizonto de Malnova Urbo kaj baldaŭ ne povis kontentigi la postulojn de la karol-tempa Prago. En la j. 1342 ĝi estis damaĝita de inundo kaj estis necese konstrui ponton novan.

La 9-an de Julio 1357 imperiestro Karolo IV. fondis novan ponton, kies konstruadon gvidis la fama arkitekto, la aŭtoro de la katedralo de S-ta Vito Petro Parler. La ponto estis konstruita en gotika stilo, el sabloŝtono, longa 520 m kaj larĝa 10 m, ĝi staras sur 16 pontarkaĵoj kaj la konstruado estis finita en 1393. La ponto estis riĉigita per galerio de barokaj statuoj, la plejparto el la 30 statuoj kaj statu-grupoj devenas el la jaroj 1683 ĝis 1714, faritaj kun partopreno de elstaraj barokstilaj majstroj Matyáš Braun, Jan Brokof kaj liaj filoj Michal Jan kaj Ferdinand Maxrnilián.

De sur la ponto estis ĵetita en akvon kaj dronigita Johano Nepomuceno 20.3.1393, trans la ponto atakis svedoj Pragon en la j. 1648. En la j. 1723 estis tie instalita olea lumigado, anstataŭigita en 1866 per gasa lumigado, nun elektra. La ponto tre bone rezistis la inundojn en la jaroj 1432, 1496, 1784, 1890 kaj 2002, sed ĝi estis grave difektita kaj ruinigita de la inundo en la j. 1895. Grava rekonstruo de la ponto okazis en la 70-aj jaroj de la 20-a jc. Dum jarcentoj ĝi estis la sola ponto en Prago, pro tio nomata la Praga ponto (aŭ la Ŝtona ponto), ekde 1870 ĝi estas nomata Karola ponto.

## <u>La Malnova Urbo</u>

En 1a centro de la Malnova Urbo situas la Malnovurba placo, la plej malnova loko de la urbo, ĉar vojkruciĝo de la iamaj komercaj vojoj.

Ĉe la orienta flanko de la placo situas la preĝejo de Virgulino Maria antaŭ Týn kun siaj karakterizaj du turoj. Jam en la j. 1135 estis mencio pri la tiea preĝejo de hospitalo por fremdaj komercistoj. Ĝi estis romanika konstruaĵo, iam en la 2-a duono de la 13-a jc., sur tiu ĉi loko estis konstruita trinava frugotika preĝejo, kaj en la antaŭhusana tempo, iam post la j. 1365 oni komencis konstrui la nunan templon. Verŝajne konstruis ĝin la konstruistoj de Petro Parler, dum la tempo de la husana revolucio la konstruado estis interrompita kaj ĝi daŭris nur dum la regado de Georgo de Poděbrady kaj ĝis la komenco de la 16-a jc. la preĝejo estis finkonstruita. En 1679 la preĝejo forbrulis kaj la gotika volbo de la meza navo falis kaj estis anstataŭigita per baroka barelvolbo. En la husana tempo la preĝejo estis la ĉefa husana templo, jam pli frue tie predikis Konrad Waldhauser kaj Jan Milíč de Kroměříž, en la tiea paroĥa domo estis la husana ĉefepiskopo Jan Rokycana. En la tempo de la kontraŭreformacio rericevis ĝin la katolika eklezio kaj ĝi fariĝis la ĉefa paroĥa preĝejo de la Malnova Urbo. La preĝejo estas gotika, la interna ornamaĵo frubaroka. En la preĝejo troviĝas tombo de la glora dana astronomo Tycho Brahe (+ 1601).

Antaŭ la Týn-preĝejo estas la iama Týn-lernejo, la plej malnova konservita domo de la placo. Ĝi estis paroĥa lernejo. Apude estas la domo Ĉe blanka unukornulo.

La palaco Gotz-Kinský estas la plej bela rokoka konstruaĵo en Prago. Laŭ malnovaj planoj de Kilián Ignác Dienzenhofer konstruis ĝin en la j. 1755 - 1765 Anselmo Luragho. La plastikaj ornamaĵoj estas de Ignac F. Platzer. En la palaco estas nun la grafika fako de la Nacia galerio.

Tuj apude estas la antikva domo ĉe la stopa sonorilo. Iam ĝi estis barokstile alikonstruita, sed oni renovigis la originalan gotikan aspekton al la domo. Nun sidejo de la Praga galerio.

En la okcidenta flanko de la placo restas malplena loko post la norda alo de la Malnovurba urbodomo, detruita en majo 1945. Sur la pavimo estas signita la loko, kie estis ekzekutitaj la 27 reprezentantoj de la kontraŭhabsburga ribelo de la ĉeĥa nekatolika nobelaro en la j. 1621. Malantaŭ la turo de la urbodomo situas la suda alo de la Malnovurba urbodomo.

En la norda flanko de la placo estas la preĝejo de S-ta Nikolao. Sur tiu ĉi loko troviĝis preĝejo jam dum la regado de Přemysl I. (1197 -1230); 1a originala romanika konstruaĵo estis en la 2-a duono de la 14-a jc. alikonstruita al gotika preĝejo. En la j. 1732 ĝi estis malkonstruita kaj surloke estis konstruita (1732 - 1735) la nuna baroka templo laŭ planoj de K. I. Dienzenhofer. En 1787 la preĝejo estis malfondita, sed poste nove restaŭrita, en la j. 1874 - 1918 ĝi servis al la rusa ortodoksa eklezio, poste al la ĉeĥoslovaka eklezio. Ĝi estas centra konstruaĵo kun riĉa statua ornamaĵo de Antonín Braun.

La vico de la domoj ĉe la norda flanko de la Malnovurba placo estis konstruita antaŭ cent jaroj en la novbaroka stilo, kadre de la praga asanacio. El la malnovaj domoj restis nur la iama paŭlana monaĥejo, konstruita post la j. 1684 laŭ planoj de Jan Dominik Canevalle. Ĝi havas 1a

originan frubarokan fronton kun alta pinjono kun statuoj de M. V. Jäckl el la j. 1696.

La Sudan flankon de la Malnovurba placo formas la konservitaj domoj de urbanoj, kiel ĉe la ŝtona tablo, ĉe la blanka ĉevaleto, Ĉe la blua stelo, Sur la ŝtono aŭ Ĉe bovo.

En la centro de la placo staras la monumento de Magistro Johano Hus, de la skulptisto Ladislav Šaloun. La monumento estis silente malvolvita en la j. 1915 en la tago de la 500-a detreveno de la martira morto de Hus.

Malantaŭ la Týn-preĝejo situas "Týn", kio estas ĉirkaŭbarita loko, en kiu la fremdaj komercistoj povis tranokti kaj pagi doganon (Ungelt). La historio de Týn komenciĝas en la 10-a jc., ĝi do estas unu el la plej malnovaj lokoj de Prago. Dum jarcentoj la tieaj domoj ŝanĝiĝis, ĝis nun konserviĝis la domo de Jakub Granovskvský de Granov el la j. 1559 - 1560. Ĝi estas konstruaĵo en la stilo de nordítala renesanco kun arkada loĝio.

Ekster Týn staras la iama monaĥejo kaj preĝejo de S-ta Jakobo la Granda, fonditaj en la j. 1232. La preĝejo estis tiam la plej granda konstruaĵo en Prago, pro tio okazis tie ankaŭ gravaj reĝaj solenaĵoj, ekz. la kronfesteno de Johano Luksemburga kaj de Elizabeta Premislidino (1311) kaj la geedziĝa festeno de la sama reĝo kun Beatrica Bourbon (1337). La romarika preĝejo estis alikonstruita al gotika templo, post incendio en 1689 la preĝejo estis alikonstruita en baroka stilo de Jan Šimon Pánek. La preĝejo de S-ta Jakobo estas trinava baroka konstruaĵo kun la fronto ornamita per stukaj reliefoj el la j. 1695 fare de Ottavio Mosto. Tre rara artista verko estas la tombo de Jan Václav Vratislav de Mitrovice, la plej alta ĉeĥa kanceliero; temas pri baroka tomba monumento konstruita laŭ projekto de Johano Fischer kaj ornamita per statuoj fare de Ferdinand Maxmilián Brokoff (1716). En la preĝejo nun okazas orgenaj koncertoj.

La Kruckavalira placo estas alia grava placo de la Malnova Urbo. Ĝin formas la Malnovurba Pontoturo de Karola Ponto, la preĝejo de S-ta Francisko, la preĝejo de S-ta Savinto kaj Klementium.

En la placo staras la monumento de Karolo IV., la fondinto de la praga universitato. La monumento estas verko de la dresdena skulptisto Ernst Hähnel kaj estis instalita en la j. 1848, okaze de la 500-jara jubileo de la universitato.

La iama monaĥejo de kruckavaliroj kun ruĝa stelo kaj la preĝejo de S-ta Francisko apartenas al karokaj konstruaĵoj de monda nivelo. La templo estis konstruita en la j. 1679 - 1689 sur fundamentoj de malnova frugotika preĝejo de S-ta Spirito fare de Dominiko Canevallo laŭ la planoj de Joh. Bapt. Mathey.

La preĝejo de S-ta Savinto estis konstruita sur la loko de iama kapelo de S-ta Bartolomeo, en la j. 1577 - 1602 elkreskis trinava konstruaĵo, fine inter 1648 - 1649 Fr. Caratti finis la konstruadon de 1a baroka templo. La turoj estis konstruitaj nur en 1714.

Klementinum estis la iama jezuita kolegio, post la Praga Kastelo la dua plej granda konstru-komplekso en Prago. Konstruigis ĝin jezuitoj en la tempo de obskuro en la j. 1650 - 1750 sur teritorio, kie antaŭe estis 32 domoj, 7 mastrumaj kortoj, 3 preĝejoj, monaĥejo de dominikaĵoj kaj kelkaj ĝardenoj. Jezuitoj fondis tie lernejojn, bibliotekom, observatorion, teatron, presejon ktp. Klementinum fariĝis bastiono de la rekatolikigado de la lando. Ĉi tie la konata pastro Koniáš forbruligis 30 mil ĉeĥajn herezajn librojn. La jezuita ordeno estis malfondita en 1773 kaj Klementinum ricevis la universitato, kiu en 1777 fondis ĉi tie bibliotekon, kiu en 1887 fariĝis publika kaj ekde la j. 1935 Nacia biblioteko. Por tiu celo en la j. 1924 - 1929 Klementinum estis moderne adaptita kaj pligrandigita.

En Klementinum troviĝas ankaŭ la t.n. Itala kapelo, konstruita en la j. 1590 - 1600 de italaj konstruistoj kaj metiistoj, kiuj ekde la duono de la 16-a jc. venis en Pragon. Apude estas preĝejo de S-ta Klimento, kiun konstruigis la jezuitoj en la j. 1711 - 1715 laŭ la projekto de Fr. M. Kaňka.

La malantaŭa fronto (malfronto) de Klementinum formas la okcidentan flankon de Maria-placo, kie en la orienta flanko staras la konstruaĵo de la Nova urbodomo – magistratejo. Konstruita en la stilo de malfrua secesio laŭ planoj de Osvald Polívka en la jo 1912. La statuaj ornamaĵoj strebas adapti la modernam konstruaĵon al la malnovtempa ĉirkaŭaĵo. Iliaj aŭtoroj estas St. Sucharda kaj Jos. Mařatka, la statuojn de Rabbi Löw ben Besalel kaj de Fera kavaliro faris Ladislav Šaloun.

Apude staras la konstruaĵo de la Urba biblioteko el la jaroj 1926 – 1930. La biblioteko mem estis fondita en 1891 kaj dum vico da jaroj (1906 - 1928) ĝia estro estis la poeto Antoním Sova. La konstruaĵon ornamas 6 alegoriaj figuroj de Lad. Kofránek. En la konstruaĵo estas ankaŭ marioneta teatro kaj ekspoziciejoj de la Urba galerio.

La sudan flankon de la placo okupas la palaco Clam-Gallas, sed ties fronto ne estas turnita al la placo, sed al la apuda Hus-strato. La palacon konstruis en la j. 1713 - 1719 Dominik Canevalle por la napola vic-reĝo Jan Václav grafo Gallas laŭ plano de viena arkitekto Jan Bern. Fischer de Erlach. La fronto estas dispartigita per tri rizalitoj, fermitaj per atiko kun tri statuoj (Jupitero, Merkuro, Venuso). En la randaj rizalitoj estas monumentalaj portaloj: sur sokloj staras du gigantoj, subtenantaj balkonon, sur kies parapeto estas du vazoj kun ludantaj anĝeletoj. La statuojn kaj ankaŭ tiujn interne de la palaco faris Matiaso Braun. En la palaco troviĝas arĥivo de la ĉefurbo Prago kun Historiaj dokumentoj, urbaj libroj, protokoloj de administraciajn organoj kaj oficaj aktoj. La plej aĝa estas la Memorlibro de la Malnova Urbo el la j. 1310. En la niĉo de la palaco en la Maria-placo estas fontano kun la personigo de la rivero Vultavo kiel juna knabino, skulptita de V. Práchner (1812).

Preĝejo de S-ta Egidio estas unu el la plej malnovaj pragaj preĝejoj. Origine estis tie romanika preĝejo el la j. 1238, la nuna gotika konstruaĵo estas el la j. 1339-1371. Post la blankmonteta batalo imperiestro Ferdinando II. donacis ĝin al dominikanoj, kiuj alkonstruis tie monaĥejon kaj en la 30-aj jaroj de la 18-a jc. ili barokigis la templon.

El la ceteraj konstruaĵoj de la Malnova Urbo rimarkindaj estas:

Pulva turo - konstruita sur la loko de la iama pordego Horská. Dum la regado de Venceslao IV. estis tie fondita la Reĝa Kortego kaj la Malnovurbanoj honore al la reĝo konstruigis tie novan pordegon. En 1475 komencis konstrui ĝin masonista majstro Venceslao, sed jam ekde 1476 la konstruadon gvidis la administranto de la Týn-lernejo Matěj Rejsek de Prostějov. Kiam en 1483 reĝo Vladislav revenis en la Kastelon, tiam la turo perdis sian signifon. Komence de la 18-a jc. estis en ĝi deponejo de pulvo, pro tio oni komencis nomi ĝin Pulva turo. Ĝi estis grave damaĝita de prusa pafado en 1757 kaj ĝi tre kadukiĝis. Savis ĝin arkitekto Josef Mocker, kiu en la j. 1876 - 1886 restaŭris ĝin en la stilo de pseŭdogotika konstruaĵo.

Apude, sur la loko de la iama Reĝa Kortego, staras nun la Komunuma domo de la ĉefurbo Prago, konstruita en la j. 1905 - 1911 laŭ projekto de Ant. Balšánek kaj Osvald Polívka, en la nova stilo (secesio). La fronton de la Komunuma domo kronas kupolo kaj la mozaiko Omaĝo el Prago de Karel Špillar. La ĉefa salono estas Salonego de Smetana, en kiu okazas koncertoj kaj publikaj solenaĵoj, sed troviĝas tie vico da aliaj solene ornamitaj salonoj.

Celetná strato estis la ĉefa vojo, kiu kunligis la iaman Reĝan Kortegon kun la Praga Kastelo. Sekve tie estis konstruitaj imponaj arkitekture kaj historie valoraj domoj. Ekz. la konstruaĵo de la urba juĝejo, kie en 1539 - 1784 estis moner-farejo, la kubisma domo Ĉe la nigra di-patrino, laŭ projekto de Jos. Gočár el la j. 1912, Menhart-domo el la j. 1700 - 1706, en kiu estis teatro kaj koncertejo, Millesimo-palaco barokstila el la duono de la 18-a jc., aŭ la Hrzán-palaco el la 18-a jc., konstruita en la pinta baroka stilo de Zikmund Valentin Hrzán de Harasov laŭ planoj de Giovanni Alliprandi, aŭ la baroka domo de Sixt, kiun post la j. 1626 aĉetis la skribisto de la ĉeĥa kancelario Filip Fabricius, la trafenestrito.

La preĝejo de S-ta Mikaelo situas en la korto de la iama samnoma monaĥejo; la plej malnova informo pri la preĝejo estas el la j. 1311, poste ĝi estis unu el la ĉefaj husanaj preĝejoj, post la batalo sur Blanka monteto estis en la j. 1640 - 1664 konstruita ĉi tie nova preĝejo, trinava baroka konstruaĵo verŝajne de Fr. M. Kaňka. Sed nun ĝi ne servas al religiaj celoj, sed estas tie projekciata aŭdo-videa programo de dubinda enhavo.

La Nobelara teatro (Stavovské divadlo) konstruita en la j. 1781 - 1783 laŭ projekto de Ant. Haffenecker en stilo de klasikismo, en la j. 1881 iom plilongigita laŭ Ia plano de Achilles Wolf. Ĝin financis grafo Nostic, pro tio ĝi estis nomata Nostic-teatro, poste Nobelara. En la teatro oni komencis ludi ekde la 21-a de aprilo 1783, komence nur germanlingve kaj itale, ekde la j. 1812 sporade ankaŭ ĉeĥe. En la j. 1787 estis tie la monda premiero de opero Don Diovanni de Mozart, kiun la komponisto persone direktis, en 1827 estis ĉi tie prezentata la unua ĉeĥa opero Dratumisto

de Fr. Škroup kaj Chmelenský, kaj en la j. 1834 la premiero de Fidlovačka, teatraĵo de Tyl kun muziko de Fr. Škroup; tie la kantisto Karel Strakatý kantis unuafoje la kanton "Ho, kie hejm"?", kiu fariĝis furorkanto kaj post la j. 1918 nia ŝtata himno.

Apude staras Karolinum, la centra konstruaĵo de la Karola Universitato. Ĝi estas gotika domo, kiun konstruigis la reĝa monerfaristo Johlinus Rotlev iam ĉirkaŭ la jaro 1370, en la j. 1383 akiris ĝin reĝo Venceslao IV. kaj donacis ĝin al la universitato. Komence de la 18-a jc. arkitekto Fr. M. Kaňka alikonstruis ĝin barokstile. Interne, la aŭlo, estis novaranĝita en la jaroj 1946 - 1950 laŭ la projekto de ark. J. Fragner, En la fronto estas gobeleno kun la bildo de Karolo IV. genuanta antaŭ princo Venceslao, laŭ projekto de Vlad. Sychra; maldekstre staras staturo de Karolo IV. de Karel Pokorný.

La preĝejo de S-ta Gallo, fondita kiel paroĥa preĝejo en la j. 1232 - 1234 konekse kun la fondiĝo de la nova kvartalo nomata Galla Urbo aŭ la Nova Urbo ĉirkaŭ la S-ta Gallo. En la preĝejo predikis Konrad Waldhauser, Milíč de Kroměříž kaj Jan Hus. Post la Blanka monteto en 1627 la imperiestro donacis la preĝejon de S-ta Gallo al karmelanoj, kiuj ĝin baroke alikonstruigis (Martin Luragho, 1738). En la maldekstre navo troviĝas la tombo de pentristo Karel Škréta.

Apude estas la konstruaĵo de la Urba ŝparkaso en la novrenesanca stilo en la j. 1891 - 1894 laŭ planoj de Ant. Wiehl kaj Osvald Polívka. Sed sur tiu ĉi loko ekde 1783 estis la unua konstanta teatro, kiu funkciis ĝis la malfermo de la Nobelara teatro. Tie en la j. 1771 oni ludis la unuan ĉeĥlingvan teatraĵon Princo Hanĉjo.

Platýz estas ludomo ĉe la suda flanko de Karba foirejo. Ĝia posedanto estis konsilanto de la kortega ĉambro Jan Platejs de Platenstein. Ĝi estas komplekso de aloj, kiuj formas kortojn kaj ĝardenojn, konstruitaj en la j. 1817 – 1825.

La Preĝejo de S-ta Marteno en la muro estis romanika preĝejo fondita en la 1-a duono de la 12-a jc. fare de princino Adléta. Kiam oni konstruis la remparojn de la Malnova Urbo (1249 - 1253), ĝi fariĝis parto de la remparoj (en la muro), en la 14-a jc., alikonstruita, en la 15-a jc. pligrandigita je du flankaj navoj. Ĉe la preĝejo troviĝis tombejo, en kiu estis enterigitaj la elstara praga skulptisto Ferd. Maxmilián Brokoff, lia patro Johano kaj lia frato Mikaelo.

En Vejvodova-strato en anguldomo n-ro 445 estis iama pilkludejo, kion konfirmas pilkoj kaj rakedoj sur la pordoj. La granda pilkuldejo estas videbla en la kelo de la domo. En la domo estis klubejo kaj biblioteko de nia klubo.

La Betlehema kapelo estis fondita en la j. 1391 de Johano de Mühlheim kaj estis destinita por ĉeĥlingvaj predikoj. En 1402 fariĝis tie predikisto Johano Hus, kiu el la Betlehema kapelo faris centron de la reforma movado de la eklezio. La Betlehema kapelo estis tre vastspaca, en ĝi povis ĉeesti pli ol trimil homoj. La kapelo estis simpla, ĝi havis nur malgrandan altarejon kaj predikejon, ĉe la orienta flanko estis la domo de la kapelservisto kun sakristio kaj supre loĝejo de la predikisto, Jan Hus vivis tie kaj laboris dum dek jaroj. Ankaŭ dum la postaj jarcentoj la kapelo servis kiel centro de utrakvista eklezio, post la j. 1609 ĝi apartenis al la Unuiĝo de bohemiaj fratoj. Post la Blanka monteto ĝi fariĝis posedaĵo de katolika eklezio, en 1661 aĉetis ĝin jezuitoj, dum Josefo II. ĝi estis malfondita kaj en la. j. 1786 detruita (forigita la tegmento kaj la suda muro), en la j. 1836 - 1837 sur tiu ĉi loko estis konstruita trietaga empira domo. Tiu estis malkonstruita post la dua mondmilito kaj surloke estis rekonstruita la Betlehema kapelo laŭ originala aspekto, laŭ la projekto de prof. ark. Josef Fragner.

Náprstek-muzeo situas en la okcidenta flanko de la Betlehema placo, en la domo U Halánků. La domon konstruigis en 1590 la primatoro Václav Krocín de Drahobejl, ĝi estis bela baroka domo, kiu ofte ŝanĝis posedantojn. En la j. 1676 aĉetis ĝin Jan Halánek de Jičín, laŭ kiu la domo poste estis nomata, en la j. 1836 aĉetis ĝin bierfaristo Ant. Fingerhut (germane fingringo), kies filo Vojta Náprstek (ĉeĥe fingringo) heredigis la domon al muzeo, kiun li en la j. 1862 fondis kaj por kiu en la j. 1886 li konstruigis novan muzean konstruaĵon, ĉe la malantaŭo de la domo laŭ planoj de ark. Baum kaj B. Münzberger. Tiel estiĝis la nuna Náprstek-muzeo, en kiu estas ekspoziciataj eksterlandaj kaj precipe eksterkontinentaj etnografiaĵoj, dokumentantaj la kulturan evoluon de diversaj popoloj. En la muzeo estas granda biblioteko kaj arĥivo de fotografaĵoj, faldfolioj, sondiskoj, kazedoj ktp. La muzeo funkcias ankaŭ kiel literatura kunvenejo, en la j. 1904 konstituiĝis

tie la Unua Virina Grupo Esperantista fare de s-ino Josefa Náprstková, la unua organizantino de la Esperanto-movado inter ĉeĥaj virinoj; la unua prezidantino fariĝis Božena Studničková, la ĉeĥa kaj Esperanta poetino.

La kapelo de S-ta Kruco, fondita eble en 1100, la plej malnova el la tri konservitaj pragaj rotondoj. En la j. 1784 la kapelo estis malfondita, poste oni intencis likvidi ĝin, sed merite de Artista societo (Umělecká beseda) ĝi estis savita kaj renovigita laŭ planoj de B. Wachsmann. La novromanika krado ĉirkaŭ la kapelo estis muldita laŭ projekto de Josef Mánes.

La placon de Jan Palach formas la konstruaĵo de la Artindustria altlernejo ĉe la suda flanko. Ĝi estas novrenesanca konstruaĵo el la j. 1884. Ĝis la j. 1902 estis tie Akademio de belartoj.

Ĉe la orienta flanko estas la konstruaĵo de la filozofia fakultato de Karola universitato, konstruita en la j. 1927 - 1928.

La nordan flankon de la placo fermas la Domo de artistoj (Rudolfínum), novrenesanca konstruaĵo de ark. Jos. Zítek kaj T. Schulz, konstruita en la j. 1876 - 1884 por la tiama bildgalerio, por la muzeo de dekoraciaj artoj kaj por la muzikkonservatorio. Ĉiujare okazas ĉi tie la muzikfestivalo La Praga Printempo.

Apude en la Strato de la 17-a de novembro troviĝas la konstruaĵo de la Artindustria muzeo aŭ Muzeo de dekoraciaj artoj, konstruita en la stilo de la franca novrenesanco. En la muzeo troviĝas kolektoj de vitroarto, glasoj, keramikaĵoj, mebloj, horloĝoj ktp.

Proksime troviĝas la konstruaĵo de la jura fakultato de Karola universitato el la j. 1928 - 1929.

La preĝejo de S-taj Simono kaj Juda, renesanca konstruaĵo, al kiu ligiĝas la iama monaĥejo kaj malsanulejo de Mizerikordaj fratoj. La konstruaĵoj estis konstruataj de la 1-a duono de la 17-a jc. ĝis la duono de la 18-a jc. Sur la riverbordo estis en 1930 konstruita nova malsanulejo Na Františku, ornamita de plastikaĵoj de Čeněk Vosmík.

La monaĥinejo de S-ta Agnesa estas komplekso de konstruaĵoj, la unuaj en la gotika stilo en Bohemio. Oni konstruis ĝin ekde la jaro 1233 ĝis la okdekaj jaroj de la 13-a jc. Ĝi estas monaĥinejo de klaraninoj fondita sur la bordo de Vultavo en la nordokcidenta parto de la Malnova Urbo. Fondis ĝin reĝo Venceslao I. kun sia fratino Agnesa Premislidino. Agnesa, ekde la j. 1990 sankta, fariĝis la unua abatino de la nova monaĥinejo. Ekde sia komenco ĝi fariĝis fokuso de la gotika arkitekturo en Prago.

La kerno de la monaĥinejo fariĝis la konvento kaj la dunava preĝejo de S-ta Francisko, finkonstruita ĉirkaŭ la j. 1240. Iam antaŭ la j. 1240 la monaĥinejo estis pliampleksigita je la dua parto, la vira monaĥejo. La fondiĝo de la minorita klostro en tuŝapuda najbareco de la klaraninoj elvokis bezonon de nova preĝejo por la monaĥinoj, ĉar la minoritoj transprenis ilian preĝejon de Sta Francisko, al kiu ĉirkaŭ 1250 ili alkonstruis pastrejon. Tuj apude konstruiĝis la nove fondita preĝejo de la klaraninoj. La monaĥejo de la minoritoj malfondiĝis en 1419 kaj ne estis renovigita. De la duono de la 13-a jc. estis konstruitaj la galerio kaj grandspaca volbita kuirejo kaj alta murego, konservita en la okcidenta flanko de la komplekso. La ĉefa frugotika konstruado de la monaĥinejo de S-ta Agnesa estis finita ĉirkaŭ la jaro 1260. Ekde la 70-aj jaroj estis konstruata la altarejo ĉe la virina preĝejo de S-ta Savanto kaj en la 80-aj jaroj estis konstruita la maŭzoleo de Premislidoj kun la tombo de la fondintino de la monaĥinejo S-ta Agnesaa. Per tio la konstruado estis finita. Laŭ ordono de Jozefo II. la monaĥinejo estis malfondita kaj ekde tiam ĝi kadukiĝis kaj estis hejmo de malriĉuloj. En la 90-aj jaroj de la 19-a jc. oni intencis malkonstrui ĝin en la kadro de la ĝenerała renovigo (asanigo) de la Malnova Urbo. Sed kleruloj sukcesis savi la unikan arkitekturan memoraĵon kaj laŭ projekto de arkitekto Ant. Cechner estis restaŭritaj ambaŭ preĝejoj kaj parto de la klostraj konstruaĵoj. La rekonstruado daŭris plu kaj post 1965 estis decidite la monaĥejan komplekson disponigi al Nacia galerio.

La preĝejo de S-ta Gastulo situas en la Gastula placo, surloke de la iama romanika preĝejeto el la j. 1234, ĉe kiu ekzistis hospitalo de beata Agnesa. Dum jarcentoj la preĝejo estis kelkfoje alikonstruata, dum incendio en 1689 ĝi parte ruiniĝis. Riparis ĝin Pavel Ignác Bayer. Nun la preĝejo estas gotika, parte barokigita. Ĝi havas kvar navojn, la plej malnovaj estas la suda kaj la ĉefa, pli novaj estas la navoj nordaj. Altaroj kaj la instalaĵoj en la preĝejo estas barokaj.

## La Juda Urbo

En la Judan Urbon eblas veni el la Pariza strato. En parko inter la Pariza kaj Maisel-stratoj troviĝas bronza statuo de Moseo de Fr. Bílek el la j. 1905 (denove instalita en 1947 post la detruo fare de faŝistoj).

Flanke de la parko troviĝas la Malnova-nova sinagogo, la plej malnova juda preĝejo konservita en la centra Eŭropo. Ĝi estas frugotika konstruaĵo el la tempo ĉirkaŭ la j. 1280, dunava, kun riĉa skulptornamo.

La sinagogo situas ĉe la strato Maisel; la nomo devenas de Marko Mordeĥaj Mayz1 (+ 1601), la plej riĉa homo de Prago de Rudolfo II. Post sia morto li postlasis duonmilionon da florenoj de kontanta mono, ne parolante pri aliaj posedaĵoj. Li havis grandan signifon kaj aŭtoritaton en la praga getto. Per mono li elaĉetadis ĉe la imperiestra kortego avantaĝojn kaj privilegiojn ne nur por si mem, sed ankaŭ por la ceteraj pragaj judoj.

Kontraŭ la sinagogo staras la estinta Juda urbodomo el la fino de la 16-a jc, fare de konstruestro P. Roder. La domo estis poste alikonstruita en malfrubaroka stilo fare de arkitekto J. Schlesinger. Nun tie troviĝas la Juda religia komunumo.

Apude staras la t. n. Alta aŭ Urbodoma sinagogo, konstruita post 1577 de P. Roder per financoj de Mordeĥaj Mayz1.

Proksime troviĝas la t.n. Klaus-sinagogo, konstruita en 1694 sur loko de hospitalo, sinagogo kaj talmuda lernejo. La sinagogo estis ekstere moderne aranĝita en la j. 1884 kaj en ĝi troviĝas parto de la ekspozicio de la Ŝtata juda muzeo. La muzeo estis fondita jam en la j. 1906 kaj dum la dua mondmilito ĝi estis ŝanĝita de nazioj je granda instituto por kontraŭjuda batalo. En 1950 la muzeo fariĝis la Ŝtata juda muzeo.

En la najbara konstruaĵo el la jaro 1906 fare de ark. Gerstl en stilo de pseŭdoromanika kasteleto, troviĝas nun muzea ekspozicio dediĉita al la periodo de la 2-a mondmilito.

Ĉirkaŭe, troviĝas la Malnova juda tombejo, fondita iam en la 1-a duono de la 15-a jc. kiel kompenso por la likvidita pli malnova juda tombejo, kiu situis en la loko de la nura Vladislavova-strato. La tombejo estis dum jarcentoj plilarĝigata, sed en 1787 oni ĉesis tie enterigi. En la tombejo troviĝas ĉirkaŭ 20 000 tomboŝtonoj ekde la j. 1439 ĝis la fino de la 18-a jc. Temas pri plataj diskoj kaj arkitekture ornamitaj ŝtonaj tombejo. La plejmulto de interesaj kaj artisme valoraj el ili devenas el la 17-a jc. En la muro de Klaus-sinagogo estas enmurigitaj gotikaj diskoj el la 14-a jc., trovitaj sur la originala juda tombejo en la Nova Urbo en Vladislavova-strato. La plej malnova tomboŝtono de Abigdor Kár el la j. 1439 estas iom norde de Pinkas-sinagogo. Ĉe la muro de korto de Artindustria muzeo estas tombo de Mordeĥaj Mayzl. Proksime de tie, ĉe la tombeja muro, staras renesanca tombo de rabeno Jehuda Löw Ben Bezalel (+ 1609), la supozata kreinto de Golemo kaj fondinto de glora rabena lernejo.

Ĉe la suda rando de la tombejo staras Pinkas-sinagogo, post la Malnov-nova la plej aĝa kaj arkitekture plej valora praga sinagogo, fondita en la j. 1479 de rabeno Pinkas, plivastigita en la j. 1535 de lia nepo Aron Meŝulem. En la sinagogo estas instalita memorejo de judoj turmentmortigitaj fare de faŝistoj. Sur la muroj de Pinkas-sinagogo estas skribitaj nomo de judoj, kiuj en la j. 1940 - 1945 fariĝis viktimoj de la faŝista rasismo. Troviĝas tie nomoj de 77 297 judoj el Bohemio kaj Moravio, kiuj pereis en gaskameroj, sur ekzekutejoj kaj en koncentrejoj. Sekve la Pinkas-sinagogo estas grandega tomboŝtono de ĉiuj ĉi homoj, kiuj devis morti sen ia ajn kulpo, nur pro tio, ke ili estas judoj.

## La Nova Urbo

La Nova Urbo estis fondita fara de Karolo IV. la 26-an de marto 1348, kiam li metis la angulŝtonon. La Nova Urbo havas areon de 360 hektaroj kaj estas trioble pli granda ol la Malnova Urbo. Ĝi estis aranĝita tiamaniere, ke ĝi kontentigis la bezonojn de urbanoj dum kvin jarcentoj. La nove planitaj stratoj havis larĝon de 18 ĝis 27 metroj. Estis faritaj tri centraj placoj, kaj nome la Bruta (nun la Karola), la Ĉevala (nun la Venceslaa) kaj la Fojna. La tuta Nova Urbo estis ĉirkaŭita per muregoj, kiujn oni konstruis dum nuraj du jaroj. La Nova Urbo estis finkonstruita laŭ la planoj

jam en la j. 1372 Karolo IV. intencis konstruigi el la tuta urbo fortikaĵon, gardatan norde de la Kastelo kaj sude de Vyšehrad, Prago tiutempe fariĝis eksterordinara urba verko, unika en Eŭropo.

Venceslaa placo estas la ĉefa placo de Prago, la ĉefa loko de la komerca kaj socia vivo de la urbo kaj samtempe ankaŭ loko de elstaraj politikaj eventoj. Ekz. la grandaj ĉiutagaj manifestacioj en novembro 1989 faligis la komunistan reĝimon. La placon fondis Karolo IV. en 1348, kiel Ĉevalan foirejon, sed baldaŭ ĝi evoluis en gravan novurban foirejon. La placo estas 682 m longa kaj 60 m larĝa, ties malgrandaj kaj malaltaj domoj estis en la fino de la 19-a jc. kaj komence de la 20-a jc. anstataŭigitaj per modernaj palacoj. Ekz. en la malsupra parto de la placo en la j. 1786 - 1789 staris ligna teatro Bouda (Budo), kie oni ludis ĉeĥlingve. Ekde 1865 oni enkondukis tie gasan lumigadon (la kandelabro, laŭ projekto de ark. A. Linsbauer).

La supran parton de la placo fermas kaj kronas la monumenta novrenesanca konstruaĵo de Nacia muzeo, konstruita 1885 - 1890 laŭ planoj de arkitekto prof. J. Schulz sur loko, kie ĝis 1875 estis Ĉevala pordego. La konstruaĵo en novrenesanca stilo kostis preskaŭ du milionojn da florenoj, ĝi havas kvar alojn kaj internan transan alon, en formo de oblongo, kies longa flanko havas 100 m. La ĉefa enirejo troviĝas sur kajo, super kiu staras alegoriaj skulptaĵoj de Bohemio kune kun Moravio kaj Silezio kaj Vultavo kaj Elbo ambaŭflanke; la statuoj estas de A. Wagner (1891 -1894). Ambaŭflanke de la enirejo estas simbolaj statuoj de Historio kaj Natursciencoj de J. Maudr. La fronta parto estas kronata de kupolo de Panteono. La Pnateono de la Nacia Muzeo estas nacia sanktejo, dediĉita al la memoro de grandaj personuloj de nia nacio. Tie okazas gravaj solenaĵoj, sed ankaŭ funebraj ceremonioj. Ĉirkaŭe staras statuoj kaj bustoj de niaj granduloj.

Antaŭ la Muzeo staras la monumento de S-ta Venceslao de Jos. Václav Myslbek, kreita inter 1890 - 1894, origine sur la kajo de la muzeo, starigita surloke en la j. 1912 - 1913. Ĉirkaŭ la rajdstatuo de S-ta Venceslao staras statuoj de S-ta Prokopo, de S-ta Agnesa, de S-ta Ludmila kaj de S-ta Vojteĥo (Adalberto).

La dekstra flanko de Venceslaa placo (ekde la Muzeo):

- domo de Blanka cigno (pli frue Domo de nutraĵoj) de ark. M. Gronwaldt kaj J. Chvalina (1954 - 1957)
- hotelo Jalta, projekto de A. Menzer (1955 - 1957)
- palaco Letka, plano de ark. B. Kozák (1926)
- hotelo Eŭropo (Šroubek), elstara konstruaĵo de la ĉeĥa secesio, du domoj de A. Dryák kaj B. Bendelmayer (1906)
- grandmagazeno Krone (Družba) laŭ projekto de ark. V. Klimeš, V. Růžička kaj M. Pašek (1970 - 1976)
- novbaroka palaco de Instituto por normaligo kaj inventoj (1895) laŭ projekto de ark. B. Ohmann kaj O. Polívka
- palaco Praha, konstruktivisma konstruaĵo de R. Stockar (1926 - 1929)
- hotelo Ora ansero, de M. Blecha (1910)
- hotelo Ambasadoro (1912), ark. R. Klenka kaj F. Weyr, kun kinejo kaj noktoamuzejo Alhambra
- tute sube: palaco Koruna (Kropo) kun kronforma turo supre, de ark. A. Pfeiffer (1911 - 1914) kun
- plastikaj ornamaĵoj de S. Sucharda kaj J. Štursa; en la teretaĝo estis fama starmanĝejo (ne plu); la palaco havas trairejon al la strato Příkopy (Fosaĵo), en kies centro estas la t.n. rotondo, artisme vitrita, kun reliefoj de J. Krepčík.

la maldekstra flanko de Venceslaa placo (ekde la Muzeo):

- Domo de modo, ark. J. Hrubý (1954 - 1956)
- konstruaĵo de Strojexport (Fenikso), konstruktivisma konstruaĵo de ark. B. Ehrmann, fronta flanko de J. Gočár (1928), kinejo Blaník
- Komerca banko, de F. Roith (1929 - 1931), sur la loko de iama fama bierfarejo U Primasů
- ĉe angulo de Štěpanská-str. palaco Lucerna (Lanterno) (1913 – 1917) de ark. V. Havel kaj ing. S. Bechyně, trairebla al Vodičkova-str.; la unua ferbetona konstruaĵo en Prago, enhavas vicon da kulturĉambroj, ekz. grandan salonegon (1920, alikonstruita 1936 - 1939), kinejon (1914), teatron Rokoko (1925, kiel kabareda scenejo, modernigita 1969 - 1970)
- domo de eldonejo Melantrich (1911 - 1912) laŭ projekto de B. Bendelmayer kun pentraĵoj de V.

Mayer
- domo de Wiehl, ĉe angulo de Vodičkova str., de ark. Wieh1 (1895 – 1896), pentraĵoj laŭ bildoj de M. Aleš kaj J. Fanta
- palaco de Obchodní banka (Komerca banko), klasikisma konstruaĵo de Sakař kaj Polívka (1914 - 1916)
- komerc-domo de Stýblo, kun kafejo Alfa kaj trairejo al Vodičkova-str. kaj Františkánská-ĝardeno, de ark. L. Kysela, kaj J. Jarolím (1926 - 1929)
- hotelo Adrie, barokstila, de ark. J. Zika (antaŭ 1789)
- hotelo Tatran, ark. P. Janák (1931)
- domo Ĉe Triopo (nun ŝparkaso), ark. A. Dlabač, elstara postsecesia konstruaĵo en Prago
- Domo de ŝuvestoj (Baťa) kaj domo de Lindt (1927), de ark. L. Kysela - ekzemploj de arkitektura funkciismo; en la domo de Lindt estis en la j. 1975 - 1978 farita enirejo en la metroan stacion Můstek (same kontraŭe en la palaco Krono)

La stacioj de metroo en Venceslaa placo:
- sub la Nacia muzeo, stacio de trako C (1974) kaj de linio A (1978)
- en la meto de la placo: subirejo (1966 - 1968) laŭ projekto de ing. Strašil k. a., (1978) enirejo al la stacio Můstek de linio A de metroo, de ark. Z. Volmann kaj J. Srp
- en la stacio Můstek estas videbla restaĵo de la ponteto, kiu trans la rempara fosaĵo kunligis la Novan Urbon kun la Malnova Urbo.

Pro la stacio Můstek oni malkonstruis la domon de tekstilioj (1901) kaj konstruis (1975 - 1982) administran palacon ČKD laŭ projekto de ark. G. kaj J. Šrámek.

En la metroa stacio kruciĝas la linioj A (1973) kaj B (1985).

La strato Na příkopě (Sur fosaĵo), unu el la ĉefaj arterioj de Prago. Ĉi tie troviĝis akvofosaĵo, kiu dividis la du pragajn urbojn, la Malnovan kaj la Novan.

Palaco Sylva-Taroucca (barok- kaj rokok-stila konstruaĵo de Kilián Ignác Dienzenhofer kaj Anselmo Luragho, 1743 - 51),

domo Ĉe nigra rozo, kun romantisma fronto el la j. 1847, nove rekonstruita, kiel trairejo kun vendejoj

domo de Ĉeĥa Komerca banko, kun memortabulo de B. Němcová, kiu 21.6.1862 mortis en la ĉi-tiea domo Ĉe tri tilioj, la busto fare de B. Neužil el la j. 1932,

Panská-strato kun rimarkindaj konstruaĵoj, kiel la piarista kolegio, rokoka konstruaĵo el 1760-1766, Kaunic-palaco el la j. 1782, kie nun troviĝas Muzeo de Alfons Mucha, Stahlburg-domo en la stilo de dua rokoko el la j. 1861 - 1862,

preĝejo de S-ta Kruco, pli frue piarista, preĝejo, ĝi estas simpla empira saloneg-aspekta konstruaĵo; ĝi najbaras al la piarista (poste Akademia) gimnazio, konstruita en 1816 - 1824 kiel parto de la kolegio en la Panská-strato

Slava domo, origine palaco de Příchovský, konstruita de Filip Heger en la j. 1797 - 1798 sur loko de frubaroka palaco; en ĝia korto en la j. 1934 estis konstruita domo kun ampleksaj restoraciaj kaj societaj salonegoj, secesia palaco kaj lastatempe pligrandigita je pluaj konstruaĵoj kun 10 kinejoj kaj vendejoj, kun areo de 32 000 $m^2$,

Ĉeĥa nacia banko estas ampleksa moderna konstruaĵo, proponita de Fr. Roith kaj konstruita 1936 - 1938, sur loko de la iama fama hotelou Ĉe blua stelo, en kiu en 1866 estis subskribita la aŭstra-prusa paco.

Kontraŭe apud la Pulva turo estas konstruaĵo de Komerca banko el la j. 1930 - 1937, post la dua mondmilito estis tie CK KPĈ ("sinjoroj de Pulva turo"),

la palaco Myslbek, moderna vitra konstruaĵo (finita antaŭ kelkaj jaroj), komplekso de vendejoj, trairejo al Ovocný trh,

grandmagazeno (iama Infana domo), konstruktivisma konstruaĵo el la j. 1927-1928,

konstruaĵo de Komerca banko el la j. 1908 kun plastikaĵoj de Fr. Metzner.

El la Venceslaa placo tra la Strato de la 28-a de oktobro eblas iri al Jungmann-placo kaj Nacia avenuo.

En la Strato de 28-a de oktobro troviĝas muzeo de vaksaj figuroj kaj ĉe alia angulo

grandmagazeno Perla, el la j. 1930 - 1931, nun banko.

En la centro de Jungmann-placo staras monumento de Josef Jungmann, ĉeĥa lingvisto kaj vortaristo, la monumento estas komuną verko de ark. Barvitius kaj de L. Šimek, malvualita 17. 5. 1878.

La orientan flankon de la placo formas la estinta franciskana paroĥa domo (el la j. 1788), post kiu leviĝas la preĝejo de Maria Virgulino la Neĝa, fondita antaŭ la j. 1378 de Karolo IV, por karmelanoj. Ĝi estas parto de projektita trinava templo, sed la konstruado estis interrompita dum la husana movado, renovigita nur en 1606. Ĝi estas ununava konstruaĵo kun la volbo 33 m super la tero, konstruita en la stilo de karola gotiko. La altaro, la plej alta en Prago, prezentas Virgulinon Maria super neĝkovrita monto.

La Nacia avenuo estiĝis ĉi tie en la j. 1781 sur la loko de remparoj kaj fosaĵoj, ambaŭflanke bordata de plejparte modernaj konstruaĵoj.

Ĉe la malnovurba flanko staras la domo Platýz, en la angulo de Perštýn kaj Nacia avenuo staras moderna vitra konstruaĵo de eldonejo de infanaj libroj Albatros el la j. 1966 - 1968 de ark. Stan. Franc kaj Luděk Hauf, surloke de la iama fama kaj populara kafejo Union, klasikisma konstruaĵo el la fino de la 18-a jc. Poste sekvas la konstruaĵo de Akademio de sciencoj (pli frue de ŝparkaso), kies dekstra parto estis konstruita en la j. 1858 - 1861, la maldekstra en la j. 1894 - 1896. La lasta konstruaĵo en la vico estas la palaco de Lažanský, konstruita en la j. 1861 - 1863 en la stilo de la franca renesanco. En ties teretaĝo troviĝas la konata kafejo Slávie.

Ĉe la novurba flanko de Nacia avenuo situas palaco Adrie, el la j. 1923 - 1925 de ark. Pavel Janák kaj Jos. Zasche, konstruita en la t.n. nacia stilo kaj almemoriganta, la arkitekturon de la itala frurenesanco.

Apude estas la klasikisma palaco de Porges el Portheim, sur kies fronto estas la busto de generalo A. V. Suvorov, kiu en tiu ĉi domo estadis en la j. 1799 - 1800. Plue menciinda estas la monaĥinejo de ursulaninoj kun la preĝejo de S-ta Ursula. La ordeno de ursulaninoj fondis la monaĥinejon en 1674, en 1704 oni konstruigis la preĝejon laŭ la projekto de Marko Antonio Canavalle, ĝi estas ununava baroka konstruaĵo. Tuj apude staras la t. n. Nova scenejo kune kun kafejo kaj restoracio kaj administra konatruaĵo de Nacia teatro. La komplekso de konstruaĵoj estis konstruita laŭ projekto de Pavel Kupka kaj Karel Prager en la j. 1977 – 1981. Al la publiko ĝi estis transdonita 18. 11. 1983. Post la Velura revolucio oni konstatis, ke unu el tiuj konstruaĵoj staras sur parcelo apartenanta al la ursulaninoj kaj sekve la monaĥinejo ricevis eĉ la konstruaĵon, kompreneble senrajte, sed politikistoj ne kapablis interveni. La ursulaninoj venis malmultekoste la konstruaĵon al eksterlanda firmao kaj la ĉeĥa ŝtato tiel perdis unu el siaj kulturaj memorindaĵoj.

Jam en la j. 1844 la gvidantaj ĉeĥaj patriotoj Fr. Palacký, Jos. Jungmann, J. K. Tyl, Jan Ev. Purkyně k. a., postulis, ke ĉeĥoj havu sian propran teatron, en kiu oni povus ludi teatraĵojn ĉeĥlingve ĉiutage. Ĉeokaze ili sendis petskribon al imperiestro Ferdinando V. por permeso konstrui memstaran ĉeĥan teatron en Prago. La imperiestro sendis permeson, sed ne Ferdinando V., sed nur la nova imperiestro Francisko Jozefo I. en 1849, sub kondiĉo, ke oni ne postulos ŝtatajn subvenciojn. La praga administracio en 1850 permesis organizi monkolektadon, sed ĝi progresis malrapide. Nur en 1852 oni povis aĉeti grundon por la teatro. Oni trovis konvenan parcelon sur la bordo de Vultavo, kaj ĉar la monkolektado progresis malrapide, d-ro Rieger proponis en januaro 1862 konstrui dume "Provizoran teatron" laŭ projekto de I. Ullmann, kaj jam en decembro 1862 oni komencis ludi tie. La provizora teatro servis dum 21 jaroj. La 16. 5. 1868 estis metita la angulŝtono de teatro laŭ projekto de ark. Josef Zítek. Somere 1881 la teatro jam preskaŭ estis preta kaj oni provizore malfermis ĝin pro vizito de la aŭstra tronheredanto Rudolfo. Sed la 11-an de aŭgusto 1881 sur la tegmento komenciĝis incendio kaj la teatro preskaŭ komplete forbrulis. Savita estis la tuŝapuda Provizora teatro. La tragedio elvokis novan ondon de monkolektado kaj dum nuraj ses semajnoj oni kolektis milionon da florenoj. Laŭ projekto de ark. Jos. Schulz la teatro estis rekonstruita kaj la 18. 11. 1883 ĝi estis solene malfermita per la opero Libuše de B. Smetana. La teatro estis konstruita laŭ projekto de J. Zítek en la stilo de norditala malfrua renesanco, de ark. Jos. Schulz, kiu post la incendio rekonstruis la teatron, ne malkonstruis la Provizoran teatron, kiel estis antaŭvidite, sed enkomponis ĝin en la Nacian teatron kaj ankoraŭ alkonstruis al ĝi la domon por la

direktoraro de la teatro, la t.n. Schulz-domon.

Interne la teatro estas riĉe ornamita, al tio kontribuis la tuta generacio de artistoj, pentristoj M. Aleš, Fr. Ženíšek, J. Tulka, V. Hynais (la feran kurtenon), V. Brožík, J. Mařák, skulptistoj B. Schnirch (statuoj sur la atiko kaj trigoj), Ant. Wagner, J. V. Myslbek (statuoj sur la flanka portalo) k. a.

Tuj kontraŭ la Nacia teatro en la rivero Vultavo troviĝas la t. n. Slava insulo, pli frue nomata Farbista, poste Žofín (Sofia insulo). Sur la insulo troviĝas reprezenta konstruaĵo kun granda salono, rekonstruita en novrenesanca stilo. Ekde la duono de la 19-a jc. Slava insulo estas centro de la kultura kaj socia vivo. En la j. 1841 okazis ĉi tie la dua ĉeĥa balo, la 2-an de junio 1848 estis ĉi tie inaŭgurita Slava kongreso. En 1921 okazis ĉi tie la 13-a UK de Esperanto kaj estis ĉi tie fondita SAT. Okazis tie ankaŭ gravaj koncertoj, ekz. koncertis ĉi tie Liszt kaj Berlioz kaj unuafoje en Prago ankaŭ Jan Kubelík.

En la norda flanko de la insulo estas monumento de B. Němcová (K., Pokorný, 1955), en la suda parto staras la novurba akvodistribua turo (1495). Apud ĝi estas la domo de la iama societo Mánes, la domo konstruita en 1930 en moderna konstruktivista stilo, enhavas ekspoziciajn salonegojn, societajn kaj restoraciajn ĉambrojn kaj rigardoterason ĉe la rivero, laŭ projekto de ark. O. Novotný (1930).

Karola placo estas la plej granda placo de Prago (80 552 m2), origine ĝi servis kiel foirejo de brutaro, pro tio ĝi estis nomata Brutara foirejo. Nur en la 2-a duono de la 19-a jc. ĝi estis transformita en publikan parkon. En ĝi estas instalitaj statuoj de gravaj personoj, kiel Karolina Světlá (G. Zoula, 1910), Eliška Krásnohorská (K. Vobišová, 1931), Vít. Hálek (B. Schnirch, 1881), Benedikt Roezl (Č. Vosmík, 1898).

La Novurba Urbodomo estis fondita baldaŭ post la fundo de la Nova Urbo, iam antaŭ la jaro 1367 kaj finkonstruita en la j. 1416, sed neniam ĝi atingis ian gravecon, ĉar la graveco de la tiea placo mem estis malgranda. Post la j. 1734, triam la kvar pragaj urboj estis kunigitaj en unu urbon, la urbodomo entute perdis sian originan signifon kaj transformiĝis en juĝejon, oficejojn kaj malliberejon. La Urbodomo estis konstruata kiel novkonstruaĵo kaj per tio ĝi diferencas de la Malnovurba Urbodomo, kiu konsistas el unuopaj aĉetitaj domoj. En la ĉefa suda alo estas en la teretaĝo konservita dunava salonego el la j. 1411 - 1418 kun ses volbitaj kampoj, subtenataj de du potencaj cilidroformaj pílieroj. En la unua etaĝo de la orienta alo (ĉe Vodičkova-str,) estas granda salono kun gotika ripa volbo sur renesancaj subtenaĵoj. Ĉe la angulo de la urbodomo troviĝas turo kun kapelo en la unua etaĝo. La kapelo estis barokigita en la unua duono de la 18-a jc. La tuta konstruaĵo estis kelkfoje alikonstruata kaj la ĉefa fronto ricevis renesancan aspekton. Post granda incendio en la j. 1559 okazis plua alikonstruo kaj tio daŭras ĝis nun.

La preĝejo de S-ta Ignaco, monumenta konstruaĵo de la jezuita ordeno, kun la konstruaĵo de la novurba jezuita kolegio. Jezuitoj ricevis en 1623 de imperiestro Ferdinando II. kapelon de Dia korpo; tio ne sufiĉis al ili, tial sur loko de 23 domoj kaj 13 ĝardenoj ili konstruis unue kolegion kun kapelo de S-ta Francisko kaj nur en la j. 1665 – 1678 la novan preĝejon. Projektis ĝin Dominik Orsi kaj konstruis Karlo Luragho, la ceteraj alkonstruitaj partoj estas de Paulo Ignaco Bayer.

Ĉe la angulo de Karola placo kaj Ressl-strato staras la novrenesanca konstruaĵo de la ĉeĥa tehnika altlernejo, konstruita en 1867 de ark. J. Ullmann. Ornamas ĝin la statuoj de Laboro kaj Scienco (A. Popp) kaj la plastikaĵoj de genioj (J. V. Myslbek, 1879). La Ĉeĥa teĥnika altlernejo estis fondita en 1707 kaj ĝi troviĝas en diversaj konstruaĵoj, ekde 1868 en tiu ĉi, sed nun ĝi estas en diversaj konstruaĵoj tra Prago, ekz. ankaŭ en la novaj domegoj en Dejvice.

Ĉe la kontraŭa angulo de la Ressl-strato estas ĵus finkonstruata grandega modernega komerca konstruaĵo fare de sveda firmo, malgraŭ protestoj, ke tiu ĉi vitrodomo tute ne konvenas en la historiam placon.

Rimarkinda estas la malfruempira konstruaĵo de la Fakultata malsanulejo, konstruita post la j. 1790. Ĉe la suda flanko de la hospitalo staras la t.n. Faust-domo. Ĝi apartenis al la angla alkemiisto Ed. Kelley kaj poste al Mladota de Solopysky. Ĉar Mladota ŝatis alkemion kaj fizikon, oni komencis rakonti pri la domo diversajn legendojn. La domo estas renesanca el la 2-a duono de la 16-a jc.

La preĝejo de S-ta Johano sur Roketo (na Skalce) estas la unua konstruaĵo de K. I. Dienzenhofer, konstruita en la j. 1730 - 1749 en baroka stilo.

Sur la alia flanko de la strato troviĝas unu el la plej gravaj pragaj memoraĵoj, la templo de Maria Virgulino kaj de slavaj patronoj kaj la estinta monaĥejo de benediktanoj en Emauso aŭ Ĉe slavoj. La monaĥejo estis fondita de Karoto IV. ĉe malnova podskala paroĥa preĝejo de Kosma kaj Damiano en la j. 1347 kaj en ĝin estis enkondukitaj sudslavaj benediktanoj. Laŭ ili la monaĥejo estis nomata Ĉe slavoj. Ili baldaŭ konstruigis novan templon, kiu estis finita kaj konsekrita en la j. 1372 je la paska lundo, t.e. en la tago, kiam estas legata la evagelio pri la disĉiploj irantaj en Emauson. Husanoj aranĝis ĉi tie konsistorion kaj klostron. En la 2-a duono de la 17-a jc. benediktanoj alkonstruigis al la preĝejo du turojn, sed la 14-an de februaro 1945 dum bombado de Prago la preĝejo estis grave damaĝita kaj la du turoj detruitaj. La riparoj komenciĝis tuj en la j. 1946, estis necese renovigi la tutan preĝejon, ĉefe la detruitan volban plafonon, kaj poste oni longe solvis la problemon de la restarigo de la du forigitaj turoj. Fine, sub la tiama politika premo estis akceptita la projekto de Fr. M. Černý, laŭ kiu la turoj estis anstataŭigitaj per du ferbetonaj pintformaj ŝeloj. La benediktanoj, kiuj en la monaĥejon revenis post la falo de komunismo, kolektas nun monon por renovigi la originajn turojn.

La silueto de la Emaus-preĝejo respondas al la konstruaĵoj sub ĝi sur la bordo de Vultavo. Tie estis konstruitaj en la j. 1924 - 1929 konstruaĵoj de ministerioj laŭ projekto de B. Hypšman. Ili estas karakteriza esprimo de la novtempa ĉeĥa urbanizo.

Apude, sur la Palacký-placo staras la monumento de grava ĉeĥa 19-jarcenta politikisto kaj historiisto František Palacký, konstruita en la j. 1898 - 1902 laŭ la projekto de skulptisto Stanislav Sucharda. Ĝi simbolas la personecon kaj verkon de tiu ĉi grava persono. La tiea ponto trans Vultavo nomata Palacký-ponto estis konstruita en la j. 1876 – 1878.

La estinta podskala doganejo Na výtoni estas malfrugotika masonita domo el la tempo ĉirkaŭ la j. 1500. Nun estas tie muzeo.

La preĝejo de Maria Virgulino *Na slupi* kun monaĥejo de servantoj, nun medicinista instituto; la monaĥejon fondis Karolo IV. en la j. 1360, en la j. 1420 dum, sieĝado de Vyšehrad tra difektita kaj renovigita nur en 1664 – 1670. Dum Jozefo II. la monaĥejo estis likvidita, sed en 1858 rekonstruita en novgotika stilo kaj transformita al mensmalsanulejo. La preĝejo estis konstruita frue post la fundo de la monaĥejo, ĝis nun ĝi konservis la gotikan aspekton kun svelta 5-etaĝa turo.

La preĝejo de Maria Virgulino Dolora estas unu el la umaj verkoj de K. I. Dienzenhofer. En tiu ĉi loko origine estis vitejoj, nur fine de la 17-a jc. estis ĉi tie fondita instituto por tro aĝaj pastroj kaj ĉe ĝi en 1679 kapelo de Maria Virgulino. En la j. 1722 ili estis aĉetitaj por monaĥinejo kaj malsanulinejo de elizabetaninoj, sed ĉar la konstruaĵoj ne sufiĉis al la kreskanta nombro de malsanuloj, en la j. 1724 -1731 la instituto estis plivastigita kaj estis konstruita nova preĝejo. La tuta objekto estis rekonstruita kaj moderna aranĝita en 1930 – 1938 por la malsanulinejo de elizabetaninoj, nun estas tie hospitalo de Praha 2.

En la fino de la strato *Ke Karlovu* troviĝas la preĝejo de Ĉieliro de Maria Virgulino kaj de Karolo la Granda kun la iama klostro de la monaĥoj de S-ta Aŭgusteno. La klostro estis fondita de Karolo IV. en la j. 1350 kaj jam en la j. 1377 estis konsekrita la templa konstruaĵo, farita laŭ la modelo de la sepulta preĝejo de Karolo la Granda en Aĥeno, la patrono de Karolo IV. Antaŭ la j. 1575 estis farita la nura stelforma volbo de la navo laŭ ark. Bonifac Wohlmut. La klostro estis likvidita en la j. 1785 kaj baldaŭ poste estiĝis ĉi tie malriĉulejo. La templo havas nekutiman formon de okangula navo kaj li interno estis kelkfoje alikonstruata.

La preĝejo de S-ta Apolinario konstruita post la j. 1362, gotikstila, ununava konstruaĵo.

Michna-somerkasteleto (nomata ankaŭ Amerika) estas ĉarma baroka konstruaĵo el la j. 1712 - 1720 fare de K. I. Dienzenhofer por Jan Václav Michna de Vacínov. Ĝi situas en bele aranĝita ĝardeno. En la domo estas muzeo de Antonín Dvořák.

La monaĥejo de ordeno de S-ta Aŭgusteno kun la preĝejo de S-ta Katerina. La monaĥejon fondis en 1355 Karolu IV., dum Jozefo II. (1787) la monaĥejo estis likvidita kaj transformita je mensmalsanulejo. La preĝejo de S-ta Katerina estis konsekrita en la j. 1367 de ĉefepiskopo Jan Očko de VIašim. En. la 15-a jc. ĝi estis detruita, novaj konstruaĵoj de la preĝejo kaj de la monaĥejo

el a j. 1737 - 1741 estas de Fr. M. Kaňka. En 1787 la preĝejo estis likvidita kaj fariĝis parto de la mensmalsanulejo. La preĝejo estas belega baroka konstruaĵo, en kies fronto estas enkonstruita la malnova gotika turo, kies kvareĝo transiras en okeĝon.

La preĝejo de S-ta Stefano estas frugotika konstruaĵo, fondita de Karolou IV, en la j. 1351 kiel paroĥa preĝejo de la supra parto de la Nova Urbo. Ĝi estis konstruita ĝis la komenco de la 15-a jc., sed aliaj kapeloj kaj antaŭĉambroj estis alkonstruataj pli poste. En la j. 1074 - 1079 ĝi estis purisme regotikigita. La preĝejo estas trinava gotika baziliko, kun la ĉefa navo pli alta.

Proksime de la preĝejo staras la kapelo de S-ta Longeno, la plej malgranda el la tri pragaj rotondoj. Ĝi estiĝis eble en la 12-a jc., la unua historia informo pri ĝi estas el la j. 1234. En la j. 1782 ĝi estis likvidita, sed poste ĝi estis riparita kaj renovigita.

En la supra parto de la Venceslaa placo estas moderna konstruaĵo de la iama parlamento de Ĉeĥoslovakio, konstruita en la j. 1936 - 1938 kiel borso, laŭ projekto de ark. Jar. RössIer, sed post la dua mondmilito rekonstruita kaj pligrandigita por la parlamento, nun estas tie la radio-stacio Libera Eŭropo. Pro danĝero de terorista atako la ŝtataj aŭtoritatoj intencas forigi la radiostacion el la centro de Prago. La konstruaĵo mem per sia modernega aspekto tute ne konvenas sur la lokon, kie ĝi troviĝas, inter la historiajn konstruaĵojn de Nacia muzeo kaj de Ŝtata operejo.

La konstruaĵo de la Ŝtata operejo (iam la Germana teatro) estis konstruita en la novrenesanca stilo en la j. 1886 - 1888 laŭ projekto de la vienaj arkitektoj F. Fellner kaj H. Helmer fare de ark. M. Wertmüller. Dum la dua mondmilito ĝi estis difektita, sed tuj poste riparita por prezentado de operoj kaj baletoj.

La domego de la ĉefa fervoja stacidomo estis konstruita en 1905 -1907 en la secesia stilo laŭ projekto de ark. J. Fanta, ornamita per vico da skulptaĵoj. Sub la stacidomo estis konstruita vasta halego por pasaĝeroj, laŭ projekto de ark. J. Danda kaj aliaj, en la j. 1972 – 1977. Sub la halego estas metroa stacio.

Petschek-palaco estas iama domo de banko, konstruita en la j. 1923 -1925, dum la germana okupacio sidejo de gestapo. Malbonfama torturejo

La ĉefa poŝta oficejo en Jindřišská-str. konstruita post la j. 1871, ties halo estis rekonstruita kaj nove aranĝita lastatempe.

La preĝejo de S-ta Henriko fondita samtempe kun la Nova Urbo (1348) kiel paroĥa preĝejo de la malsupra parto de la Nova Urbo. Ĝi estas trinava gotika konstruaĵo.

Apude staras la sankthenrika sonorilturo el la j. 1472 ĝis 1476, en la j. 1879 regotikigita. Al la sonorilturo estas alkonstruita ampleksa konstruaĵo de oficejoj (nun banko).

La palaco Swerts-Špork en Hybernská-strato ekestis per kunigo de la klasikismaj domoj, el kiuj la larĝan konstruis ĉirkaŭ la j. 1780 Ant. Haffenecker kaj la mallarĝan domon post la j. 1790 Ignác Palliardi. La plastikan ornamaĵon faris la laborejo de Ignác Platzer jun. En la j. 1923 - 1925 estis post la mallarĝa domo alkonstruita moderna konstruaĵo laŭ projekto de Josef Gočár.

Rimarkinda konstruaĵo en Hybernská-strato estas la t.n. Popola domo, la iama Kinský-palaco. Ĝi estis konstruita sur loko de tri domoj en frubaroka stilo ĉirkaŭ la j. 1660 laŭ planoj de Karlo Luragho. Fine de la 18-a jc. ĝi estis novaranĝita kaj fariĝis la centrejo de social-demokrata partio. En la j. 1912 okazis ĉi tie la Praga konferenco de la rusa soc. dem. partio, kiun sekrete partoprenis ankaŭ V. I. Lenin. En la j. 1920 estis ĉi tie likvidita la provo fari bolŝevistan revolucion kaj la lando por preskaŭ du jardekoj restis demokrata ŝtato.

Fine de Hybernská-strato, sur la Placo de Respubliko, troviĝas la ekspozicia domo Ĉe Hibernoj, la plej bela praga empirstila konstruaĵo el la j. 1808 – 1811. Origine ĝi estis baroka preĝejo, konstruita de la irlandaj franciskanoj (hibernoj), samtempe kun la apuda monaĥejo. La objekto estis adaptita por ekspoziciaj celoj en la j. 1940-1942, en la apuda monaĥejo estas distrikta oficejo de Prago.

La fervoja stacidomo "Masarykovo nadraží" estas la plej malnova praga fervoja stacidomo, konstruita en la jaroj 1844 - 1845 laŭ projekto de ing. Ant. Jüngling, sur loko de iamaj barokaj remparoj kaj ĝardenoj. La unua trajno venis ĉi tien la 20-an de aŭgusto 1845. La aŭtoroj de la stacidomaj konstruaĵoj ne estas konataj, supozeble ili estis la vienaj arkitektoj Pavel Sprenger kaj Petr Nobile.

Kontraŭ la stacidomo estas domo, la iama hotelo Royal, konstruita en la stilo de angla gotiko. Tie estis la unua moderna praga kafejo, kiun en la j. 1845 malfermis Šimon Heichen-Walder. En tiu ĉi domo loĝis kaj post la reveno de la tirola ekzilo en Brixen mortis la 29-an de julio 1856 Karel Havlíček Borovský.

La Muzeo de la ĉefurbo Prago estis fondita en 1883 kaj ĝia konstruaĵo en la stilo de la itala renesanco estis konstruita en la j. 1896 -1898. En la muzeo estas ekspoziciataj memoraĵoj pri la historio de la Urbo kaj pri ties politika, ekonomia kaj kultura vivo. Aparte menciinda estas la modelo de Prago de Antonín Langweil (1791-1837).

En la strato Na Poříčí (Sur riverbaseno) estas vico da valoraj konstruaĵoj, kiel palaco Axa el la j. 1932, ministeria konstruaĵo en la nacia stilo, vitra supermagazeno Blanka cigno el la j. 1938.

La preĝejo de S-ta Petro en Poříčí, kie estis iama germana vilaĝo en Prago, estis origine ligna konstruaĵo, sed antaŭ la j. 1178 estis tie konstruita romanika trinava baziliko. Dum jarcentoj la preĝejo estis alikonstruata, rekonstruata kaj pligrandigata, post incendio en 1689 ĝi estis parte barokigita, sed en la j. 1874 - 1879 regotikigita. Ĝi estas romanika-gotika trinava baziliko kun du turoj en la fono.

La preĝejo de S-ta Jozefo, ĉe la Placo de Respubliko, estis konstruita en la j. 1636 - 1653 de Melichar Mayer. Ĝi estas simpla konstruaĵo de kapucena tipo. Apude estis kapucena monaĥejo, kiu post la nuligo en 1795 estis transformita je kazerno. Tie longe laboris kiel militista librotenisto Jos. Kajetán Tyl, kiu en la j. 1834 verkis ĉi tie la tekston de la kanto "Ho, kie hejm'?", kiu estas nia nacia himno.

En. la Ressl-strato troviĝas la preĝejo de Cirilo kaj Metodio, el la jaro 1730, poste kiel preĝejo nuligita, sed poste en 1934 - 1935 renovigita kaj disponigita al la ĉeĥa ortodoksa eklezio. En la kripto de la preĝejo kaŝis sin la ĉs. paraŝutistoj, kiuj faris atencom kontraŭ la regnan protektoron R. Heydrich kaj kiuj pereis ĉi tie la 18-an de junio 1942. Atestas tion memortabulo kun iliaj nomoj sur la muro de la preĝejo.

En la Ressl-strato estas ankaŭ la preĝejo de S-ta Venceslao en Zderaz, de la ĉs. Eklezio. Ĝi estas gotika konstruaĵo el la 14-a j., sur la loko de la origina romanika preĝejo el la j. 1170.

Vyšehrad

Vyšehrad apartenas al la plej memorindaj lokoj de Prago, sed ĝiaj komencoj estas vualitaj de legendoj kaj mitoj pri la komenco de la ĉeĥa ŝtato dum la regado de la unuaj Premislidoj. Origine ĝi estis nomata Chrasten. Ĝi ekestis iom pli poste ol la Praga Kastelo, en la unua duono de la 10-a jc.

Vyšehrad sur alta roko ĉe la kunfluo de Vultavo kaj Botiĉo estis priloĝata jam en la 3-a jarmilo antaŭ Kristo. En la malfrua ŝtonepoko ĝi estis grava altsetlejo. Sed la unuaj informoj pri ĝi venas nur el la tempo de regado de Boleslao II. (972 - 999), kiam ĉi tie troviĝis monerstampejo, kie oni produktis denarojn. Dum lia regado Vyšehrad estas normala premislida fortikaĵo kun princa palaco en la okcidenta parto kaj kun ŝtonaj kaj lignaj loĝdomoj en la mezo de la fortikaĵo. De tiu tempo devenas antaŭromanikaj otonstilaj ekleziaj konstruaĵoj.

En la dua duono de la 11-a jc. ĉi tie ekloĝis princo Vratislao II. (1061 - 1092), pli poste la unua ĉeĥa reĝo. Li malakordiĝis kun sia frato Jaromír, la praga episkopo, kaj transigis tien sian sidejon el la Praga kastelo kaj avancigis Vyšehrad al la ĉefa loko de la lando. Li konstruigis tie ŝtonan romanikan kastelon kun granda princa palaco, bazilikon de Petro kaj Paŭlo, bazilikon de S-ta Laŭrenco kaj rotondon de S-ta Marteno. Post Vratislao II. sur Vyšehrad regis ankoraŭ Bořivoj II., Vladislao I. kaj Soběslav I., sed poste la ĉeĥaj reĝoj revenis al la Praga kastelo kaj Vyšehrad perdis sian signifon. La lasta Premislido enterigita en Vyšehrad estis Soběslav II., en la j. 1178. Ekde la duono de la 13-a jc., tre malproksime de Prago, Vyšehrad poiome kadukiĝis. El la eksa reĝa rezidenco fariĝis izolita administrejo de la kapitulo.

Ĝia reĝa gloro estis denove vekita dum la regado de Karolo IV., estis renovigita la reĝa palaco, gotika kastelo, gotike alikonstruita la templo kaj ĉirkaŭe konstruitaj muregoj, konekse kun la konstruado de Nova Urbo de Prago. Tiuj muregoj estis anstataŭigitaj per nova baroka remparo en la mezo de la 17-a jc. Kun la reĝa palaco estis konstruataj ankaŭ domoj por la servistaro, akvokondukilo kaj lernejo.

En la j. 1420 okazis ĉi tie batalo de husanoj kun la armeo de reĝo Sigismundo. La husanoj venkis kaj preskaŭ ĉiuj ĉi tieaj konstruaĵoj estis detruitaj. La glora historio de Vyšehrad finiĝis. Nur la arkeologiaj esploroj informas nin pri la iama riĉeco de tiu ĉi loko.

Nova fortikigo de Prago okazis en la 2-a duono de la 17-a jc., tiam Vyšehrad estis transformita en potencan fortikaĵon. Konstruis ĝin Karel Luragho kun Jan de Capauli kaj Santino Bossi laŭ la planoj de J. M. Conti kaj J. Priami. Interne de la fortikaĵo estis konstruita militista citadelo kaj apude restis nur la kapituło de Vyšehrad kun la preĝejo de Petro kaj Paŭlo. En la j. 1866 la fortikaĵo estis nuligita, la citadelo forbrulis kaj ia tuta loko estis transformita en parkom kaj apud la preĝejo de Petro kaj Paŭlo estis instalita nacia tombejo.

Nun restas tie la Táborská-pordego el la j. 1655 - 1656, kiu apartenas al la estera remparo, poste estas la Leopold-pordego, konstruita antaŭ la j. 1670 laŭ planoj de Karel Luragho kaj kiu fermis la internan parton de la fortikaĵo.

La plej malnova konservita konstruaĵo sur Vyšehrad estas la rotondo de S-ta Marteno. Ĝi estis konstruita en la 2-a duono de la 11-a jc. fara de princo Vratislao II. Ĝis la j. 1782 ĝi servis kiel preĝejo, post tio ĝi fariĝis militista magazeno. Post la j. 1848 ĝi servis ankaŭ kiel loĝejo de malriĉuloj. Poste minacis al ĝi malkonstruo, sad dank' al grafo Chotek ĝi estis savita kaj inter la j. 1878 - 1880 sub gvido de arkitekto Ant. Baum ĝi estis rekonstruita kaj interne ornanita.

En la konstruaĵo de la malnova kapitula dekanejo troviĝas la fundamentoj de la iama romanika baziliko de S-ta Laŭrenco el la tempo de reĝo Vratislao.

Sur la loko post la forbruligita citadelo troviĝas num parko, kun statu-grupoj de J. V. Myslbek de sur la Palacký-ponto. Sur tiu ĉi loko situis la origina romanika palaco de ĉeĥaj princoj kaj poste la gotika reĝa palaco de Karolu IV.

La preĝejo de Petro kaj Paŭlo estas kapitula kaj paroĥa templo, pseŭdogotika alikonstruaĵo el la j. 1885 - 1887. La fronto kaj la turoj estas nur el la j. 1902 - 1903. El la origina gotika templo konserviĝis nur la flankaj navoj kaj la najbaraj kapeloj.

Tuj apud la preĝejo situas la Nacia tombejo, sur loko de iama malnova tombejo. En la j. 1889 la urbestro de Smíchov Petr Fischer konstruigis ĉi tie la gloran lokon Slavín, en kiu estas enterigataj la plej gravaj ĉeĥoj, verkistoj, artistoj, ĉiuj, pri kiuj la surskribo sur Slavín diras: Malgraŭ tio, ke ili mortis, ili parolas plu. Unu flankom de la tombejo formas la preĝejo, la ceterajn formas ornamaj arkadoj. La arkitektura aranĝo de la tombejo, la arkadoj kaj Slavín, estas de arkitekto A. Wiehl, la statua ornamo de J. Mauder el la j. 1892. Multaj tomboj estas verkoj de gravaj artistoj.

Ekster la tombejo staras rajdstatuo de S-ta Venceslao de Jan Jiří Bendl, el la j. 1678, kiu iam troviĝis en la Venceslaa placo.

## Aliaj pragaj kvartaloj

### Vršovice

La preĝejo de S-ta Venceslao, unusola praga konstruktivisma katolika templo, konstruita en j. 1929 - 1930 laŭ la projekto de J. Gočár. Ĝi estas simpla monumenteca konstruaĵo kun fronta turo 80 m alta.

La preĝejo de S-ta Nikolao, baroka kirko konstruita en 1704 sur loko de malnova romanika preĝejeto.

La vilao Gröbe (Gröbovka) estas novrenesanca konstruaĵo en stilo de la itala renesanco, konstruita en la j. 1879 - 1881. En 1945 difektita de usona bombado, sed en 1953 rekonstruita kaj uzata kiel infandomo.

### Vinohrady (Reĝa Vinberejo)

La preĝejo de S-ta Ludmila, pseŭdogotika (novgotika) konstruaĵo laŭ planoj de Jos. Mocker, el la j. 1888-1893. Trinava konstruaĵo kun transversa navo kaj kun du 60 m altaj turoj en la fronto.

La Nacia domo (kulturdomo) en novrenesanca stilo projektita de Ant. Turek. En ĝi estas granda Majakovskij-salonego, en kiu la rusa poeto persone deklamis siajn poemojn. Krome estas tie multaj aliaj salonoj kaj klubejoj, kafejo, vinejo kaj restoracio.

La Teatro de Vinohrady en secesia stilo konstruita en la j. 1905 - 1907 laŭ projekto de AloisČenský. La frontan flankon de la teatro formas du pilonoj kun simbolaj statu-grupoj Opero

kaj Dramo de Milan Havlíček kaj sur la kornico statuoj de Bohumil Kafka. La teatro estas post la Nacia teatro la dua plej grava scenejo en Prago. En 1921, dum la 13-a UK esperantistaj amatoroj ludis tie la teatraĵon Nokto en Karlův Týn de J. Vrchlický en traduko de M. Lukáš.

La preĝejo de la Plej Sankta Koro de l' Sinjoro, moderna preĝeja konstruaĵo el la j. 1928 - 1932 laŭ projekto de Josip Plečnik. Ĝi estas impona salonega konstruaĵo kun larĝa turo.

En Parko de Sv. Čech staras monumento de Sv. Čech de J. Štursa (1924).

La bazaro de Vinohrady, konstruita en 1902 laŭ la novrenesanca projekto de Ant. Turek. Kelketaĝa konstruaĵo kun vasta vendohalo kaj kun vendejoj en ĉiuj etaĝoj. En la 90-aj jaroj de la 20-a jc. rekonstruita kaj modernigita.

Žižkov

La Domego de Ĝenerala Pensia Instituto (nun Centra Sindikata Oficejo) estas finkonstruita en 1934 laŭ projektoj de Jos. Havlíček kaj Karel Honzík. Ĝi estas ferbetona dekunu-etaĝa konstruaĵo interne moderne ekipita.

La Nacia memorejo sur Vítkov staras sur la loko, kie la 14-an de julio 1420 husanoj sub la komando de Jan Žižka venkis en kruela batalo kun multnombre pli granda armeo de papaj kruckavaliroj. La monumentforma konstruaĵo estas projektita kaj konstruita de ark. Jan Zázvorka. La angulŝtono estis metita la 28-an de oktobro 1928 kaj la konstruado estis finita en 1938. En la j. 1949 estis tie entombigita la korporestaĵoj de nekonata ĉs. soldato elterigita en la batalloko ĉe Dukla. La komunistaj regantoj transformis la konstruaĵon en maŭzoleon kaj entombigadis tien siajn mortintajn ĉefojn. Post la velura revolucio la komunistaj kadavroj estis de tie forigitaj kaj nun estas serĉata la ideo, kiel renovigi kaj revivigi la konstruaĵon, por ke ĝi vere estu vivanta kaj vizitata de homoj. Sur la teraso antaŭ la memorejo ekde la j. 1950 staras la rajd-statuo de Jan Žižka de Trocnov de skulptisto Bohumil Kafka. La statuo estas 9 m alta, la ĉevalo 9,6 m longa, la pezo estas 16,5 tunoj. En la teraso estas la tombo de la nekonata soldato.

Olšany (Alno-vilaĝo) estis iam malgranda vilaĝo malproksime de la urbo, jam en la j. 1394 notita kiel posedaĵo de la novurba monaĥejo de ambrozianoj. En la tempo de pesto en la. j. 1660 la praga malnovurba civito aĉetis tie grandan ĝardenon por aranĝi tie tombejon por la mortintoj pro la pesto. Samtempe estis tie konstruita preĝejo konsekrita al la pesto-patronoj S-taj Rochus, Sebastiano kaj Rozalia. Ankaŭ dum pluaj pestoj (1713-1714 kaj 1771) oni enterigadis ĉi tie. Poste, kiam estis malpermesite entombigadi interne en urboj, la ĉi-tiea tombejo fariĝis la ĉefa tombejo por la tuta Prago. Nun troviĝas ĉi tie 12 tombejoj, ankaŭ la juda kaj la tombejoj de soldatoj el la unua mondmilito, de falintoj el la praga insurekcio en majo 1945 kaj ankaŭ de la ruĝarmeanoj pereintaj dum la liberigo de Prago. En la tombejoj estas enterigitaj multaj gravaj personoj kaj tomboj estas ornamataj per valoraj funebraj plastikaĵoj, plejparte malfrurokokaj kaj empiraj.

Karlín

Ĝi estas praga kvartalo ekkonstruita nur en la j. 1817 sur teritorio, kie ekster la urbaj muregoj troviĝis nur malsanulejoj por malsanuloj kun kontaĝaj malsanoj. En la j. 1731 - 1737 oni konstruis ĉi tie Invalidejon laŭ planoj de K. J. Dienzenhofer kaj verŝajne ankaŭ de Jos. Emanuel Fischer de Erlach. Ĝi estis ampleksa sociala institucio por invalidoj kaj iliaj familioj, sed fine estis konstruita nur unu naŭono de la planita amplekso.

Dume la kvartalo Karlín kreskis, en la j. 1903 ĝi fariĝis urbo kaj en 1922 kvartalo de Prago.

La preĝejo de Cirilo kaj Metodio estis konstruita inter 1854 - 1863 en novromanika stilo kaj ĝis 1897 estis farata la interna ornamaĵo.

La Muzik-teatro en Karlín (la iama Varieteo) estis konstruita en la j. 1881 kaj en la j. 1896 - 1898 alikonstruita en pseŭdobaroka stilo. Dum la pasintjara inundo la kvartalo Karlín estis plej grave trafita kaj la teatro ĝis nun ne funkcias.

Letná

La ponto de Svatopluk Cech, konstruita 1906, estis modernigita en la j. 1953 - 1956. Apud la ponto staras la kapelo de S-ta Maria Magdalena el la j. 1635; dum la modernigo de la ponto kaj

apuda ŝoseo la kapelo estis transportita 31 m pli suden.

Supre sur la Letná-esplanado en la j. 1956-1962 estis grandioza monumento de J. V. Stalin, fare de skulptisto Otakar Švec. La monumento estis forigita en la j. 1962. Nun restas tie la postamento rememoriganta al ni la vanecon de ĉiu gloro.

Hanavský-pavilono staras ĉi tie ekde la j. 1898; ĝi estas ekspozicia pavilono de Komárov-ferfabriko en la jubilea ekspozicio en 1891, donacita de la tiama posedanto de la fandejo princo Hanavský al la urbo Prago. Ĝi estas el gisfero laŭ projekto de ark. Heiser kaj nun en ĝi estas restoracio.

La t.n. Brusela pavilono alportita ĉi tien el la monda ekspozicio en la j. 1958, projektita de ark. Fr. Cubr, Jos. Hrubý kaj Zdeněk Pokorný, ĝi estis restoracio kun ampleksa teraso, nun kaduka.

Kramář-vilao konstruita en 1908-1911 laŭ projekto de Bedřich Ohmann, almemorigas barokan kasteleton.

La palico de mezlernejo kaj de internulejo de nobelaj infanoj kronstruita per subteno de grafo J. P. Straka de Nedabylice. La barokan konstruaĵon projektis Václav Roštlapil kaj konstruis Quido Bělský. Post la rekonstruo fare de ark. Ladislav Machoň ĝi estas nun la Oficejo de la ĉeĥa registaro.

Nacia teknika muzeo estis konstruita en moderna konstruktivista stilo en la j. 1938-1941. Ekspoziciataj estas tie diversaj maŝinoj, aparatoj, trafikiloj (la unuaj motorcikloj, aŭtomobiloj, lokomotivo, aviadiloj ktp.).

La vintra stadiono sur insulo Štvanice (Kurĉasejo), kunligita al la bordoj per Hlávka-ponto (1908 - 1912), estis konstruita en 1934, okazis tie gravaj enlandaj kaj internaciaj hokeaj matĉoj, en februaro 1947 la ĉs. hokeistoj unuafoje akiris ĉi tie la orajn medalojn.

La domego de la Transporta entrepreno de Prago, konstruita en 1927 en konstruktivista stilo, La preĝejo de S-ta Antonio en pseŭdogotika stilo el la j. 1908 - 1911.

La konstruaĵo de Nacia galerio en konstruktivista stilo el la j. 1925 - 1928 laŭ projektoj de Oldřich Ty1 kaj Josef Fuchs, origine destinita por la praga foirejo. Sed post la j. 1948 la foiroj estis transigitaj al Brno, la konstruaĵo perdis sian signifon kaj ŝanĝiĝis al sidejo de oficejoj de diversaj komerc-organizaĵoj. Post incendio en 1974 ĝi estis 20 jarojn riparata kaj fine destinita al la modernaj kolektoj de la Nacia galerio. La palaco okupas areon de 110 x 60 m, ĝi havas surterajn kaj 2 subterajn etaĝojn.

La Praga ekspoziciejo estis ekkonstruíta somere 1890 kaj la jubilea ekspozicio estis malfermita la 14-a-n de majo 1891. La centron de la ekspoziciejo formas la Industria palaco laŭ projekto de Bedřich Münzberger, la ŝtala konstrukciaĵo laŭ projekto de Fr. Prášil. La palaco estas 250 m longa, 60 m larĝa, la dekoracia turo en la fronto de la halo estas 51 m alta. Antaŭ la palaco etendiĝas la t.n. honora korto 200 m longa kaj 70 m larĝa, malantaŭ la palaco estas granda lumfontano teknike aranĝita de inĝ. Fr. Křižík. Krome estis tie aliaj ekspoziciaj konstruaĵoj, sume 146. La ekspoziciejo funkciis plu, eĉ post la fino de la jubilea ekspoziejo, en la sekvintaj jaroj okazis tie pluaj ekspozicioj ekonomiaj, konstruistaj k.a. kaj estis alkonstruataj pluaj ekspoziciejoj, kiel la historia pavilono de Wieh (nun la lapidarejo de Nacia muzeo), Arkitekto Jan Koula konstruigis novan pavilonon por la dioramo de Batalo ĉe Lipany, de pentristo Luděk Marold kaj aliaj, el la j. 1898. Post la dua mondmilito, kiam ĉi tie ne plu okazis foiroj, la ekspoziciejo estis transformita en kulturan parkon, la industria palaco en kongresejon, kaj estis alkonstruitaj Malgranda scenejo, Granda scenejo, Somera teatro, panorama kinejo, ekspozicia pavilono el la Mondekspozicio 1958 en Bruselo, Sporta halo laŭ projekto de Jiří Krásný.

Okaze de la jubilea ekspoziciejo en 1891 estis sur la monteto Petřín konstruita rigardoturo alta 60 m laŭ la modelo de la pariza Ejfelturo, laŭ projekto de Fr. Prášil, kaj estis konstruitaj kablotramoj de Újezd al Petřín kaj de la vultava bordo al Letná-esplanado, de kie kondukis tramlinio al la suda rando de Stromovka (Ĉasarbaro), aranĝita de Fr. Křižík.

La planetario en la Ĉasarbaro estas rondforma konstruaĵo kun diametro de 24 m kaj alto de 24 m, konstruita ekde la j. 1958.

La Reĝa ĉasarbaro (Stromovka) estis fondita de la reĝo Johano Luksemburga. Imperiestro Rudolfo II. aranĝis ĉi tie grandan artefaritan fiŝlagon, en kiun oni fluigis akvon el Vultavo tra

speciala subtera mingalerio. En la j. 1804 la ĉasarbaro estis transformita al publika parko.

La somerkasteleto Troja estis somera rezidejo de Šternbergoj; ĝi estis konstruita en formo de antaŭurba vilao en la j. 1679 - 1691, de franca pentristo kaj arkitekto Jean Baptisto Mathey, nomata ankaŭ Matheus Burgundus, antaŭ li en la komenco de konstruado laboris Domenico Orsi. La eksteran ovalan ŝtuparon el la j. 1685 - 1703 ornamas statuoj de trojaj herooj la dresednaj skulptistoj Johano Georgo kaj Paŭlo Heermann. La internajn bildojn pentris Francesco Giovanni Marchetti kaj Abrahamo kaj Izako Godyna. La kasteleton ĉirkaŭas franctipa ĝardeno konstruita de Georgo Seemann en la j. 1698. Malantaŭ la posta fronto de la kastelo situas mastrumaj konstruaĵoj el la j. 1691. Al la kastelo apartenis ankaŭ la kastela bierfarejo, muelejo kaj du bienoj.

La praga zoologia ĝardeno estis fondita en 1931 de prof. Jiří Janda kaj ĝi troviĝas sur la grundoj de la iama troja grandbieno sur la areo de 40 ha. Oni vivtenas tie ĉirkaŭ dumil bestojn de 450 specioj.

Sur la teritorio inter Strahov, Smíchov kaj Břevnov estis konstruitaj sportaj stadionoj. La Granda strahov-stadiono estis konstruita en 1933 kaj ĝi estas la plej granda stadiono por amasaj gimnastikaj prezentadoj en la mondo. La ekzercejo estas 300 m longa kaj 200 m larĝa., kaj samtempe povas tie ekzerci 16 000 sportistoj. En la ĉirkaŭantaj tribunoj povas sidi 250 000 spektantoj. Tie okazas amasaj ekzercadoj, motorciklaj vetkuroj k. a. Okazis tie sokol-kongresoj kaj spartakiadoj. La dua estas la Evžen Rošický-stadiono, kiu estas la plej granda futbala kaj atletika stadiono, ĉar tie povas ĉeesti 60 mil spektantoj. La tria estas la Malgranda strahov-stadiono kun gimnastikejo, trejnkampoj kaj kurvego, kaj fine estas tie la Stadiono de amikeco.

La Gastejo ĉe kaŝtanarbo estas historia loko de la nialanda laborista movado, ĉar en aprilo 1878 okazis ĉi tie la fonda kongreso de la unua politika organizaĵo de ĉeĥaj laboristoj - la ĉeĥa social-demokrata partio laborista. Poste en la domo estis fondita Muzeo de la komencoj de la ĉs. laborista movado.

La benediktana monaĥejo en Břevnov estas la unua vira monaĥejo en Prago, fondita en la j. 993 de episkopo Adalberto kaj de princo Boleslao II. La monaĥejo estas unueca baroka kvadratforma komplekso de konstruaĵoj kun korto en la centro. La pordegon konstruigis K. I. Dienzenhofer en 1740, ambaŭflanke de la korto estas mastrumaj konstruaĵoj, ĉe la norda flanko estas la monaĥeja konstruaĵo kun preĝejo. La preĝejo de S-ta Margareta estas baroka el la jaroj 1708 - 1715 laŭ projekto de K. I. Dienzenhofer. Ĝi staras sur la loko de malnovaj preĝejoj de S-ta Margareta, la romanika kaj poste la gotika. Ĝi estas ununava oblonga konstruaĵo interne riĉe ornamita. La monaĥejo estis loĝejoj de monaĥoj, en la etaĝo estas prelatejo kaj Terezia salonego kun surplafona fresko la Míraklo de beata Günter, pentraĵo de bavara pentristo Kosma Damian Assam el la j. 1727, unu el la plej raraj pentraĵoj de la praga baroko. La konstruaĵo de konvento situas en la centra alo. En la teretaĝo troviĝas vintra manĝosalono, sakristio, kapitula salono kaj somera manĝosalono, en la supra etaĝo estis muzeo, arĥivo kaj biblioteko. En la monaĥeja ĝardeno estas somerkasteleto kun kapelo super puto.

La ĉasarbaro Stelo (Hvězda) estis fondita en 1534 de reĝo Ferdinando I. kaj ĉirkaŭita per murego kun du pordegoj. En la arbaro estis bredata ĉasbestaro por amuzo de ĉeĥaj reĝoj. Komence de la 19-a jc. la ĉasarbaro, estis transformita je natura parko kaj ŝatata ekskursejo de praganoj.

La somerkasteleto Hvězda (Stelo) situas en la centro de la ĉasarbaro estis konstruita en la j. 1555 ĝis 1556 en formo de sespinta stelo; la konstruadon komencis Jan Maria del, Pambio kaj Jan Luchese, finis ĝin Hans Tirol kaj Bonifác Wohlmuth. En 1951 la kasteleto estis riparita por la Muzeo de Alois Jirásek kaj Mikoláš Aleš. Apud la kasteleto okazis la tragedia batalo sur Blanka monteto en 1620, kiam tie estis venkita la nekatolika nobelara armeo.

<u>Smíchov</u>

Malnova praga domaro rememorata jam en 1297, loko de ĝardenoj kaj vinberejoj, en la 19-a jc. rapide disvastiĝanta industrio, en 1903 urbo, en 1922 kvartalo de Prago.

La preĝejo de S-ta Venceslao estas novrenesanca trinava baziliko laŭ planoj de A. Barvitius, konstruita en 1881 - 1885.

Apude estas Portheimka (Buquojka), la baroka somerkasteleto kun ĝardeno, kiun konstruis

por si K. I. Dienzenhofer.

Sur la kontraŭa flanko de la strato staras la eksa Urbodomo de Smíchov, en la j. 1874 aranĝita el privata domo.

Kulturdomo (Nacia domo) estas secesia konstruaĵo el la j. 1907 - 1908. En la j. 1911 ĉi tie okazis kongreso de la ĉeĥa social-demokrata partio, kiu akceptis rezolucion favoran al Esperanto.

Bertramka estas malnova terkultura korto, kiu en la fino de la 18-a jc. estis posedaĵo de komponisto Fr. X. Dušek, kies edzino estis operkantistino Jos. Dušková. En la j. 1786 kaj 1791 gastis ĉi tie W. A. Mozart, ĉi tie li komponis la uverturon de la opero Don Giovanni, kiu estis unuafoje prezentata en la Nobelara teatro en Prago la 29-an de oktobro 1787, kaj ĉi tie li ankaŭ komponis la operon Titus.

La Malgrandurba tombejo ekzistis ekde la j. 1630 kaj enterigi ĉi tie oni ĉesis en 1884. Ekde tiam la tombejo estas publika parko, kulturrezervejo, kolekto de la romantika kaj empira funebra plastikarto.

La preĝejo de S-ta Gabrielo apud la iama monaĥinejo de benediktaninoj konstruita en 1883 - 1891 en la pseŭdoromantika stilo. La preĝejo estas laŭstile interesa, ĉar ĝi estas kombinaĵo de la romanika kaj malnovkristana baziliko. En la monaĥinejo nun troviĝas la Poŝta muzeo.

La preĝejo de la Koro de Jezuo kun monaĥinejo konstruitaj en 1882 - 1884 en la pseŭdogotika stilo.

Somerkasteleto de Kinský estas empira konstruaĵo el la j. 1827 - 1831, en ĝi troviĝas parto de etnografiaj kolektoj de Nacia muzeo.

Sur la ĉefa strat-kruciĝo en Smíchov, nomata Zlatý Anděl (Ora Anĝelo), super la matroa stacio Anĝelo, estis en la j. 2000 malfermita nova alta vitra komerca-administracia centro.

<u>La nuntempa Prago</u>

Dum la 20-a jc., precipe post kiam Prago fariĝis la ĉefurbo de la nova ŝtato, disvolviĝis vasta konstruado de la urbo, laŭ la plej novaj konstru-stiloj.

La secesio (nova stilo, juna stilo ks.): la komunuma domo, hotelo Parizo, hotelo Eŭropo, domo U Nováků, la Nova Urbodomo, la Asekurejo, la eldonejo Topiš, la Nacia domo en Smíchov kaj la tiea grandbazaro, la Ĉefa fervoja stacidomo kaj la Teatro en Vihohrady.

La moderno: la banko sur Můstek, la palacoj Krono kaj Lucerna k.a.

La kubismo: la domo ĉe nigra Di-patrino, la domoj en la strato de E. Krásnohorská, en la str. de Libuše, de Neklan k. a.

La nacia stilo: la palaco Adrie, la banko de Legioj.

La tradiciismo: la konstruaĵoj de la Teknika altlernejo en Dejvice, la ministerioj de agrikulturo kaj de transporto, la jura fakultato, la filozofia fakultato, la Urba biblioteko, la urba akvopreparejo en Podolí, la ministerio de socialaj aferoj, la de financoj, la Plej alta Tribunalo.

La konstruktivismo: la iama Ekspoziciejo, nun Nacia galerio, la domo Alfa en la Venceslaa placo kaj la hotelo Juliš.

La Monumentalismo: la Nacia memorejo sur Žižkov, la Nacia banko, la preĝejo de la Plej sankta koro de l' Sinjoro, la iama ministerio de mastrumado.

La funkciismo: la domo de sindikatoj, la preĝejo de S-ta Venceslao en Vršovice, la rigardoteraso sur Barrandov k. a.

La nuntempa arkitekturo: la fakultata malsanulejo en Motol, la konstruaĵo Merkuria, Koospol (nun Citibanko), la hoteloj Internacional, Olympik, Parkhotelo, Intercontinental, Panoramo, la supermarktoj Kotva, Tesco, Domov (Hejmo), la nubskrapuloj Motokov, la komerca kaj amuza centro en Hostivař, la Komunuma centro de S-ta Prokopo, la Dancanta domo (de ĉeĥa-serba arkitekto Vlado Milunič kaj de usonano Frank O. Gehra).

La praga Kongres-centro (pli frue Palaco de kulturo) estis finkonstruita en la j. 1980 laŭ projekto de kolektivo de arkitektoj fruntloke kun Jar. Mayer, Vladimir Ustohal, Ant. Vaněk kaj Jos. Karlík. Ĝi estas monobloko en formo de neregula sepangulo. La kongres-centro servas al aranĝado de kongresoj, simpozioj, koncertoj, muzikaj spektakloj kaj filmprojekciado kaj ĝi enhavas grandan Kongresan salonegon, Societan salonegon kaj en kelkaj etaĝoj salonojn, restoraciojn kaj fojerojn de

la salonoj. Ĝi havas tri surterajn etaĝojn kaj du subterajn, en la unua subtera etaĝo estas loko por parkado de 835 personaj aŭtomobiloj kaj 46 aŭtobusoj, kaj manĝejo por la laborantoj de la centro. La granda Kongresa salonego havas 1852 sidlokojn en la partero kaj 991 sur la balkono. Por pli bona akustiko ĉe koncertoj eblas malaltigi la plafonon kaj tiel malgrandigi la nombron de sidlokoj al 2071. En la fronta vando estas orgeno, ensemble aranĝita de skulptisto Kočiš. La sidlokojn formas brakseĝoj, kiuj enhavas klimatizan kaj interpretan aranĝojn. La Societa salonego, en kiu povas okazi ankaŭ bankedoj kaj baloj, havas 800 ĝis 1200 sidlokojn, laŭ la aranĝo de la planko. La kurteno estas de pentristo Martin Sladký. Kelkaj el la malpli grandaj salonoj havas vitrovandon kun elrigardo al Prago. La internon de la Kongres-centro ornamas ĉirkaŭ 150 artaj objektoj, kiel grafikaĵoj, gobelenoj, tapiserioj, pentraĵoj, statuoj kaj reliefoj de la nuntempaj artistoj. Antaŭ la konstruaĵo troviĝas la alegoria statuo fare de Jan Hána kaj ankaŭ la memor-ŝtono de la Esperantista Klubo en Praha. En la Kongres-centro okazis gravaj internaciaj kunsidoj, kiel la 81-a UK de Esperanto, aŭ la kunsido de la Monda banko kaj de la Internacie monfonduso, por kies bezonoj estis apude alkonstruitaj ankoraŭ kelkaj kelketaĝaj konstruaĵoj. Pasintjare tie okazis la kunsido de NATO.

Kun la kresko de Prago kreskis ankaŭ la bezono de rapida kaj facila komunikebleco inter la unuopaj, kaj ĉefe la ekstremaj, kvartaloj de urbo. Pri subtera fervojo en Prago revis kaj serioze okupiĝis kelkaj fakuloj kaj teknikistoj. Sed nur post la fino de la duo mondmilito la revon oni komencis realigi. En la j. 1965 oni komencis prepari la konstruadon de substrata tramo, sed baldaŭ post negativaj analizoj kaj kun la helpo de sovetiaj fakuloj oni komencis konstrui la veran subteran fervojon - la metroon. Nun funkcias tri linioj: A de Dejvice al Vinohrady, finita en 1980, B de la Sudokcidenta Urbo ĝis la t.n. Černý Most, finita 1999, C de la Suda Urbo ĝis Karlín, finkonstruita en 1974, sed daŭrigita ĝis Holešovice en 1984 kaj nun ĝi estas konstruata plu. La linio C estis la unua linio, kiu servis al la publiko. La unuopaj metroaj stacioj estas ekipitaj per vendejoj de ĵurnaloj, floroj, suveniroj k. a., iuj per artismaj ornamaĵoj, mozaikoj k. a. La ĉefa arkitekto de stacioj de la linioj A kaj B estas Evžen Kyllar, de la linio C Jaroslav Otruba. La projektoj de unuopaj stacioj estas de 39 arkitektoj, la artaj objektoj de 27 artistoj. La tri linioj de la metroo estas longaj 50 km kaj dum unu jaro ili transportas ĉirkaŭ 400 milionoj da pasaĝeroj.